Linz, Aŭstria Felső-Ausztria tartományának székhelye, tudatosan fejlődik Európa és az egész világ energiatakarékos fővárosává. A tartományi kormány kezdeményezésére és az osztrák föderációs szervezetek befolyásos szakembereinek aktív támogatásával harmadik alkalommal rendezték meg azt a tekintélyes pályázatot, amely igyekezett megtalálni azon szakma kezdeményezőit, akik természetes, alternatív, megújuló energiaforrásokat (nap, szél, biomassza) hatékony használnak fel a vízi és más energiaforrásokkal való takarékoság céljából. A pályázat legkiemelkedőbb terveit öt kategóriában jutalmazzák, az első díj egy 18 kg súlyú bronz szobor (angolul „Energy Globe”), valamint 10.000 euró.

Az első díj megszerzése érdekében 2002-ben öt kategóriában 1294 pályázat érkezett a világ 99 országából. Ezeket hozzáértő zsűri bírálta el. A döntőbe amerikai, spanyol, finn, dél-afrikai, lengyel, svájci, német, angol és francia cégek, szervezetek és civil csoportok jutottak be. A díjak átadása a linzi modern kongresszusi központban, a Design Center-ben történt, a helyi eminens közönség és újságírók előtt a következő kategóriákban: Vállalkozások, Szállítás és közösségek, Építészet és lakhatás, Egyéni és társadalmi kezdeményezések és Vízgazdálkodás.

\*\*\*\*\*

### 2.

#### Ekspedicio trovis novajn speciojn de flaŭro kaj faŭno en Nov-Gvineo\*

En pasintjara decembro ekspedicio gvidata de aŭstraliaj sciencistoj ĉe monta regiono en okcidenta Nov-Gvineo trovis „la plej similan pejzaĝon al tiu de la Ĝardeno de Edeno troveblan sur la Tero”, kiel diris unu el la partoprenantoj. Temas pri ĝangalo daŭre kovrata de

nebulo, kun preskaŭ unu miliono da hektaroj. La unua birdo, kiun vidis la ekspedicianoj, estis nekonata specio. En la dua tago ili povis rigardi la dancon je amindumo de tiaj paradizbirdoj, kies specion oni kredis jam de kelka tempo estingiĝinta. Inter pliaj trovaĵoj estas specio de rododendro kun eble la plej granda floro sur la tero. La bestoj de tiu regiono, kiuj neniam antaŭe havis kontakton kun homoj, ne timis la ekspedicianojn kaj ne fuĝis. Pro tio la sciencistoj povis observi ilin senprobleme. La ekspedicianoj diris, ke la studado de la trovitaj specioj daŭros multan tempon. Ili taksas ĉi tiun ĝangalon grandega riĉaĵo, kiun oni devas konservi per la kunlaboro de internaciaj organizaĵoj kaj la lokanoj.

\* *Új-Guinea*

### **Egy expedíció új növény- és állatfajokat fedezett fel Új-Guineában**

Tavaly decemberben egy ausztrál tudósok által vezetett expedíció Új-Guinea nyugati részén, egy hegyborította vidéken az egyik résztvevő szavaival szólva megtalálta "a földi Édenhez legjobban hasonlító tájat". Egy állandóan ködös, majdnem egy millió hektáros dzsungelről van szó. Az első madár, amit az expedíció tagjai megláttak, egy ismeretlen faj volt. A második napon pedig olyan paradicsommadarak násztáncát nézhették, amely fajt bizonyos ideje kihaltak hittek. A további felfedezések között van egy olyan rododendron, amelynek talán a legnagyobb virága van a Földön. Ennek a vidéknek az állatai, melyek korábban semmilyen kapcsolatban sem voltak az emberekkel, nem féltek az expedíció tagjaitól, és nem menekültek el. Ezért a tudósok gond nélkül vizsgálhatták őket. Az expedíció résztvevői azt mondták, hogy a talált fajok tanulmányozása rengeteg ideig fog tartani. Rendkívüli értéknek tartják ezt a dzsungelt, amelyet nemzetközi szervezetek és a helybeliek együttműködésével kell megőrizni.

\*\*\*\*\*

## **3.**

### **Adriatika marbordo**

Albana Riviero estas konsiderata kiel la lasta ekologie pura marbordo de la Adriatika Maro. Ĝia unua vidindaĵo estas Llogara, kiu estas parto de nacia parko, posedanta riĉan pinarbaron. Ene de ĝi estas pluraj vilaoj, kaj ankaŭ restoracioj, en kiuj oni ofertas freŝkuiritajn ŝafidaĵon kaj kapridaĵon. Vilaĝo Dhermi estas unu el la unue ekestintaj loĝlokoj ĉe la marbordo. Sude de ĝi videblas kasteleto, troviĝanta sur duoninsulo ĉe la golfo. Ĝi iam apartenis al Ali Paŝa, kiu estis unu el la lokaj regantoj dum la otomana periodo. Kiam Ali Paŝa kunigis siajn militfortojn kun kristanaj grekaj ribeluloj, la turka sultano sieĝis la kastelon, kaj li senkapigis la paŝaon.

Vojaĝante suden oni trapasas ankaŭ aliajn belajn vilaĝojn kaj fine atingas urbon Saranda. La ripozejo estas konata pro sia varma mediteranea klimato, kiu ebligas naĝi ankaŭ meze de oktobro en la Adriatika Maro. La urbon vidindigas longa kaj belega promenejo laŭlonge de la marbordo same, kiel domoj en paralelaj stratoj unu super la alia sur monteto.

Vizitindas ankaŭ antikva urbo Bultrint, situanta malpli ol 20 km-ojn sude. Ĝi estas protektata de Unesko-fondaĵo. La amfiteatro de Aesculapius, baptistejo kaj la antikvaj muregoj estas inter la plej gravaj arkeologiaj vidindaĵoj de Butrint.

Norde de Saranda estas majesta akvofontego nomata "Blua okulo". Estante sub la ombro de tre maljunaj kverkoj, al tiu loko estas intime ligita la legendo pri dekdukapa drako. Oni rakontas, ke la drako kaptis la junedzinojn kaj ne permesis al la vilaĝanoj ĉerpi akvon el la fonto. Post la mortigo de la drako fare de la vilaĝanoj, ekfluis klara akvo el ĝia okulo, kaj tio estigis la riveron Bistrica.

\*\*\*\*\*

## 4.

### **La rolo de la germana lingvo en la internacia komunikado**

La germana lingvo estas la 12-a mondlingvo. Tio estas la rezulto de statistiko, kompilita por UNESCO. La statistiko limiĝas je la plej ofte parolataj lingvoj de la mondo. Ĝi difinas tiujn lingvojn, kiujn parolas minimume 100 milionoj da homoj aŭ kiuj estas kiel oficiala lingvo minimume en tri ŝtatoj. Al tiuj apartenas (laŭ alfabeto ordo) la angla, araba, bengala, ĉina, franca, germana, hindia, hispana, japana, malaja-indoneza, portugala kaj rusa. La statistiko nenion diras pri ilia uzado en la internacia komunikado.

La germanan kiel gepatran lingvon parolas ĉirkaŭ 90 milionoj da homoj en tiuj sep ŝtatoj, en kiuj ĝi estas tutŝtata aŭ regiona oficiala lingvo (krom Germanio tio estas Aŭstrio, Svislando, Luksemburgio, Lihtenŝtejno, Belgio, Italio) kaj proksimume de ses ĝis ok milionoj de germanlingvaj minoritatoj en aliaj landoj.

La germana federacia registaro daŭre subtenas la disvastigadon de la germana kiel fremdlingvo. La germana reunuiĝo kaj la malfermiĝo de orienta Eŭropo komence forte vivigis la esperon pri esenca plifortigo de la internacia pozicio de la germana lingvo, kaj oni intensigis ĉi-rilatan aktivecon.

\*\*\*\*\*

## 5.

### **La svisa modelo**

Plian fojon la svisa federalismo kaj lingvopolitiko de Svislando estas prezentitaj kiel referencoj indaj por sekvi. Valoras do ekzameni, kiel funkcias la tiurilata svisa modelo, des pli, ĉar tiu lando la 10-an de marto 1999 en sia konstitucio modifis la artikolon pri la lingvoj. Tamen unue ni necesas disponi ĝustan bildon pri la svisa realo, por elimini la misan kliŝon, ke ĉiu sviso parolas tri lingvojn.

Koncerne la federalismon, oni konsciu, ke Svislando konsistas el la centra ŝtato, el 26 regionaj ŝtatoj nomataj kantonoj, kaj el ĉirkaŭ 3000 lokaj teritoriaj komunumoj. La 26 kantonoj disponas pri multrilata suvereneco, jen konkurantaj kun suvereneco de la centra ŝtato, jen ekskluzivaj. Ekzemple, pri kulturo ekskluzive suverenas la kantonoj. La lokaj komunumoj ĝuas aŭtonomecon varian laŭ la kantonoj.

Kiu jam traveturis Svislandon, tiu povis rigardi belegan panoramon, altegajn montojn kun neĝo, kiuj plezurigas la homojn. Ĉu svisanoj povis uzi kaj ĝeneraligi tiun belecon de la lando en siaj leĝoj pri la modelo pri aŭtonomio?

\*\*\*\*\*

## 6.

### Lingva identeco

La lingva identeco de Svislando estas vere kompleksa. Ĝi dependas unuavice de la fakto, ke por sviso pli gravas la kantona identeco ol aparteni al lingva komunumo. Alian gravan influon havas la fakto, ke en Svislando loĝas 1. 250.000 eksterlandanoj, tio estas 18 procentoj de la tuta loĝantaro.

La popolnombrumado en ĉiu jardeko enketas ankaŭ pri la lingva konsisto de Svislando. En 1990 oni enketis unuafoje ne nur pri la ĉeflingvo de la individuoj (t. e. la lingvo en kiu oni pensas kaj kiun oni plej majstras), sed ankaŭ pri la ĉiutaga uzado de aliaj lingvoj kaj dialektoj. Tio ebligas unuafoje nombre taksii la fenomenon jam delonge konatan: lingva identeco ofte manifestiĝas plurnivele. Ankaŭ tiu evidentiĝis, ke intensa enlanda migrado, same kiel enmigrado el multaj eksteraj landoj, relativigas la signifon de la limoj inter la lingvaj teritorioj. Tio instigas la svisan instancon konstati el la statistiko, ke Svislando estas dum transformiĝo al multkultura socio, kie vivas novaj lingvaj minoritatoj.

\*\*\*\*\*

## 7.

### Enmigrado antaŭ kaj inta

Mi loĝas en malgranda kampara urbo en la mezo de Irlando. Antaŭ malmulte da jaroj la tiea etoso estis vilaĝeca. La urbeto situas for de vojoj, kiuj kondukas al la popularaj turismaj regionoj, do estis malofte vizitata de eksterlandanoj. La plimulto de la junuloj ne restis en la urbo post la studado: preskaŭ ĉiu, kiu havis iom da ambicio, elmigris al pli promesplenaj landoj. Ankaŭ miaj tri filoj devis serĉi novan vivon eksterlande.

Tamen, post la prospero, kiu sekvis la aliĝon de Irlando al la Eŭropa Komunumo (nun Eŭropa Unio), ĉio transformiĝis. Anstataŭ amasa elmigrado, Irlando iĝis fokuso de enmigrado. Miloj da homoj el landoj, kiuj suferis de alta senlaboreco, alvenis por tie labori. La plimulto venis el Pollando, sed en nia urbo plej multnombraj estas litovoj kaj latvoj. Ankaŭ brazilanoj enmigris por labori en la lokaj viandprilaborejoj. Malpli multnombraj, tamen videblaj, estas afrikaj enmigrintoj.

Vi povas demandi min: kiel mi opinias pri tiuj enmigrantoj? Ili venis por serĉi kaj trovi laboron. Ekzistas tiuj landoj, kie ili vivas malriĉe, ne tiel libere kiel ĉe ni.

\*\*\*\*\*

## 8.

### **Kio estas Universala Esperanto-Asocio (UEA)?**

Universala Esperanto-Asocio estis fondita en 1908 kiel organizaĵo de individuaj esperantistoj. Nuntempe UEA estas la plej granda internacia organizaĵo por la parolantoj de Esperanto, kaj havas membrojn en 117 landoj. UEA laboras ne nur por disvastigi Esperanton, sed ankaŭ por vekti diskutojn pri la monda lingvoproblemo kaj atentigi pri la neceso de egaleco inter lingvoj. Ĝia Statuto listigas jenajn kvar celojn:

- disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
- agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
- plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Specialaj zorgoj de UEA estas la disvastigo de Esperanto en landoj kaj mondopartoj, kie ankoraŭ ne ekzistas memstara movado, kaj la ligado de aktivuloj en tiuj landoj kun la monda movado. Krome ĝi delonge reprezentas la Esperanto-movadon ĉe internaciaj instancoj kiel Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Konsilio de Eŭropo. UEA estas grava eldonejo, la ĉefa perpoŝta vendejo de Esperanto-libroj, kongresa sekretariejo kaj informcentro. Ĝi posedas gravan bibliotekon, kaj ĝia reto de aktivuloj estas la plej vasta kaj internacia en la movado.

Sed UEA estas multe pli ol nura serv-instanco. Ĝi estas ankaŭ movado, kiu strebas al idealo: idealo de interhoma kompreniĝo kaj kunlaboro. Tio signifas, ke multaj el ĝiaj agadoj dependas de la libervola subteno de ĝiaj membroj: ili ne pagas sin mem, sed postulas donacojn kaj oferojn. Ĝi ankaŭ bezonas aktivajn kaj saĝajn homojn por plenumi tiujn agadojn.

\*\*\*\*\*

## **Irányított fogalmazás (Levélírás) BEVEZETÉS**

1. Koran dankon por via interesa letero kaj du belegaj bildkartoj pri via urbo. Mi esperas, ke iam mi povos akcepti vian inviton vojaĝi al vi.
2. Mi esperas, ke vi fartas bone, vi resaniĝis, kaj nun vi ne havas gripon. Vi devas manĝi vitaminojn, fruktojn, trinki teon.
3. Koran dankon por viaj bondeziroj senditaj okaze de mia naskiĝtago. Mi tre bedaŭras, ke vi ne povis partopreni mian naskiĝtag-feston.
4. Mi petas vian pardonon pro mia longa silento. La afero estas, ke ni vizitis Italion. En mia sekvonta letero mi skribos al vi detale pri nia somerumado.
5. Mi esperas, ke vi ricevis mian lastan leteron, kvankam vi ne respondis longe. Ĉu vi estas malsana? Ĉu vi forveturis?
6. Koran dankon, ke vi skribis tre multe pri viaj familianoj. Tre plaĉis al mi, ke ĉiutage vi helpas al via malsana patrino.
7. Kia novaĵo estas? Vi skribis al mi tre antaŭlonge. Mi fartas bone.

8. Iomete mi maltrankviliĝis. Ĉu vi estas malsana? Vi ne skribis al mi jam kelkajn monatojn. Kio okazis? Bonvolu respondi!
9. Mi havas feliĉon, ĉar hodiaŭ mi ricevis vian leteron. Vi invitis min al Slovakio. Koran dankon, sed mi devas pripensi la aferon. Poste mi skribos pri tio.
10. Ni renkontiĝis antaŭlonge. Mi esperas, ke vi estas hejme, kaj vi povos legi mian leteron tuj.
11. Pasis du monatoj ekde tiam, ke ni konatiĝis dum la E-a renkontiĝo en Berlin. Mi estas tre feliĉa, ĉar mi ricevis vian leteron.

## BEFEJEZÉS

1. Mi finas mian mallongan leteron. Bedaŭrinde mi havas malmulte da libera tempo, ĉar mi devos helpi al mia patrino (ĉar atendas min mia amiko).
2. Mi petas vin skribi detale pri via vojaĝo al Nederlando kaj Belgio.
3. Mi esperas, ke via patrino jam resaniĝis, kaj via familio povos vojaĝi al Hispanio, kie – espereble – vi pasigos belegajn tagojn.
4. Mi deziras al vi ĉion bonan: fortan sanon, multe da feliĉo, ĝojo kaj sukceso. Skribu kiel eble pli rapide!
5. Kun koraj (esperantistaj, amikaj) salutoj...
6. Kisetas vin...

### Levél (1.)

**Írjon 17-20 soros levelet eszperantóul úgy, hogy minden irányítási szempontra térjen ki. (Ezek sorrendjét felcserélheti.) Fontos, hogy a fogalmazás összefüggő szöveget alkosson. A terjedelemben nem számít bele a dátum, a megszólítás, a búcsúzó sor(ok) és az aláírás. Csak keresztnévet írjon. Ha a szöveg teljes nevet kíván, ne a saját nevét és lakcímét írja be. Ügyeljen arra, hogy ne lépje túl az előírt terjedelmet. Írjon olvashatóan, egyértelműen. A levél formai előírásait tartsa be.**

Külföldi barátnője idén érettségizik. Jövőre pedig egy igen rangos felsőoktatási intézménybe szeretne bejutni: most, a felkészülés időszakában azonban elég ideges, nyomasztja a gondolat, hogy megbukik az érettségin. Ráadásul nagyon nehéz felvételt nyerni az általa választott intézménybe: óriási a verseny a diákok között. Az illető már arra gondol, hogy felhagy a tanulással, és inkább megvalósítja gyerekkori álmát: manöken lesz. Ön most levelet ír neki, amelyben

- tanácsokat ad arra vonatkozóan, hogyan lehet sikeresen leérettségizni, illetve hogyan lehet leküzdeni az idegességet;
- utal arra, hogy milyen előnyökkel jár majd, ha felveszik egyetemre, főiskolára;
- elmeséli egy ismerőse esetét, aki hirtelen félbeszakította a tanulmányait, és most sajnálja a ballépését;
- lebeszéli őt arról, hogy manöken legyen;
- elmondja neki saját tapasztalatát / elképzelését: hogyan vészelte át / hogyan fogja átvészelni ezt a nehéz időszakot.

Kara Marta!

Mi legis vian leteron kun intereso. Vi ne devas timi la abiturientan ekzamenon. Prave, mi timis, sed fine mia ekzameno sukcesis bone. Ankoraŭ vi havas tempon, lernu diligente. Eble lernu kun via samklasano, aŭ petu helpon de viaj instruistoj. Se vi estas nervoza, spiru profunde, provu trankviliĝi, trinku limonadon, manĝu ĉokoladon.

Se via abiturienta ekzameno sukcesos bone, vi povos studi en altlernejo, kaj poste vi ricevos bonan laborlokon. La studenta vivo estas pli gaja kaj pli facila ol la laboro. Mi havas amikon, kiu ĉesis studi kaj nun li malĝojiĝis. Li trovis nur fizikan laboron, kiu estas tre laciga kaj malinteresa. La vivo de manekoj eble estas interesa, sed tre malfacila. Ili devas esti tre maldikaj, vi ne povus manĝi normale kaj multe. Mi scias, ke vi ŝatas viziti restoracion, vi devus mendi bongustajn manĝaĵojn.

Mi preparis min al mia ekzameno kun mia patro. Eble ankaŭ viaj gepatroj aŭ amikoj povas helpi al vi. Lernu ĉiutage iom, tiel restos tempo ankaŭ por ripozi kaj amuziĝi. Ne lernu nur en la lasta minuto! Mi esperas, ke mi povis helpi al vi. Mi pensos pri vi dum tiuj malfacilaj tagoj. Skribu, kiel sukcesos via ekzameno.

Estu kuraĝa!

Budapeŝto, la 14an de februaro 2014

Salutas vin

Petra

\*\*\*\*\*

## Levél (2.)

Ön a nyári szünetben gyermekgondozóként állást szeretne vállalni egy külföldi családnál. Tavaly nyáron már vigyázott gyerekekre, és nagy örömet lelte ebben a munkában. Olyannyira, hogy elhatározta: olyan hivatást fog választani, ahol gyerekekkel foglalkozhat. Most levélben jelentkezik egy közvetítő ügynökségnél.

- Leírja, ki Ön, mivel foglalkozik, és milyen tulajdonságai teszik alkalmassá erre a munkára.
- Beszámol korábbi tapasztalatáról és arról, hogyan kapta ezt a munkát.
- Elmagyarázza, miért szerette ezt a feladatot és azt is, hogy milyen nehézségei adódtak munkája során.
- Írja meg, hogy melyik országban szeretne dolgozni, és miért éppen ott.
- Leírja, hogy a jövőben milyen formában szeretne gyerekekkel foglalkozni, és mi vonzza Önt ebben a hivatásban.

---

Estimata Sinjoro!

Mi estas Katalin Szabó el Hungario. Mi estas studentino. Mi ŝatus labori kiel infangardistino en Francio dum la someraj ferioj. Mi ŝatas infanojn, mi kantas bone kaj volonte mi ludas kun ili. Mi konas multajn rakontojn, fablojn, fabelojn, poemojn en la franca lingvo kaj en Esperanto.

Antaŭ jaro mi estis en Esperanta tendaro kun francaj infanoj. Ni ludis kaj ekskursis kune. Mia instruisto proponis al mi tiun eblecon. La tendaro tre plaĉis al mi. Estis multaj belaj ekskursoj kaj interesaj taskoj. Bedaŭrinde la infanoj ne parolis Esperanton bone, tiel mi povis interparoli

malfacile kun ili. Tio estis problemo. Mi ŝatus labori en Francio, ĉar mi volas perfektigi miajn sciojn en la franca lingvo. En la estonto mi laborus en infanĝardeno, ĉar mi ŝatas okupiĝi pri infanoj.

Sincere salutas vin

Katalin Szabó

---

### Levél (3.)

Meghívta külföldi barátját/barátnőjét!

1. Mutassa be őt!
2. Milyen programot állított össze vendége számára?
3. Írja le részletesen azt, ami barátjának/barátnőjének legjobban tetszett!
4. Elégedett-e a programmal?
5. Önt is meghívta külföldi barátja. Örül-e a meghívásnak? Mik a tervei?

---

Kara Elizabeta!

Mi petas pardonon, ke mi ne skribis al vi delonge, sed mi havis malmulte da libera tempo. Mi esperas, ke ĉe vi ĉio estas en ordo. Kiel vi kaj viaj gepatroj fartas?

Imagu! Mi havas anglan amikinin. Ŝi estas Suzana. Ŝi vivas en urbeto Sevenoaks, proksime al Londono. Ŝi estas kara, gaja, simpatia kaj bela. Ŝi havas tridek jarojn. Ŝi havas longan brunan hararon kaj blujn okulojn. Ankaŭ ŝi ŝatas vojaĝi, kiel mi. Mi invitis ŝin al urbo Debrecen. Ŝi alvenis la 13-an de julio. Ni vizitis la strandon en la Granda Arbaro, kie ni sunumis, naĝis, do pasigis la tempon tre agrable. Poste ni promenadis en la Granda Arbaro. Ni rigardis multajn birdojn kaj maljunajn, belajn, interesajn arbojn. Antaŭe ni vizitis la zoologian parkon. Tie estas krokodiloj, pingvenoj, elefantoj, ĝirafoj, tigroj, leonoj, antilopoj kaj tiel plu. Ili estis tre interesaj por Suzana. Vespere ni povis danci, gustumi hungarajn manĝaĵojn kaj drinkaĵojn en hungaraj restoracioj. Ni ridis multe.

Dum la sekvonta tago ni vizitis la Muzeon Déri. Tie ni rigardis la grandiozajn pentraĵojn de Mihály Munkácsi.

Ĉiu posttagmeze ni aĉetadis en magazenoj. Ruĝa papriko por ŝi estis ekzotika spico. Mi ĝojas, ke mi renkontiĝis kun ŝi. Ŝi revojaĝis al Anglio la 20-an de julio.

Mi estas laca, ĉar ni dancis ĉiunokte. Nun mi devas dormi multe.

Ŝi invitis min al Londono. Mi tre ĝojas, ke mi povos koni ŝiajn gepatrojn. Mi volus viziti la vidindaĵojn de urbo London kaj urbeto Sevenoaks.

Jam mi tre atendas la vojaĝon. Nun mi finas mian leteron. Baldaŭ mi skribos al vi pri mia vojaĝo. Mi deziras al vi ĉion bonan.

Hajdúböszörmény, la 15-an de aŭgusto 2014

Kun koraj salutoj

via amikino  
Bernadeta

## Levél (4.)

Külföldi barátja/barátnője a magyar konyha iránt érdeklődik.

- Sorolja fel a hagyományos magyaros ételeket.
  - Írja le, hogyan kell elkészíteni a pörköltet (töltött káposztát).
  - Önnek mi a kedvenc étele?
  - Érdeklődjön az adott ország étkezési szokásairól.
- 

Kara Petra!

Mi petas vian pardonon pro mia longa silento. En via letero vi interesiĝis pri la hungarecaĵ manĝaĵoj.

Estas kelkaj bongustaj manĝaĵoj. Ekzemple paprikita terpomaĵo, fiŝsupo, paprikita kokinaĵo kun nokoj, farĉita brasiko, patkukoj kun kazeo, patkukoj kun farĉita porkaĵo laŭmaniere Hortobágy, legomaĵo el kukurboj, kazeitaj nudeloj, buljono laŭmaniere Újházi, speciala kolbaso (hungare: hurka).

Bedaŭrinde mi ne ŝatas kuiru, sed mi akiris la recepton de paprikita stufita porkaĵo (hungare: pörkölt).

Vi devas dispecigi kaj friteti (stufeti) tranĉitaĵojn cepetojn en oleo. Poste metu ruĝan pipron sur ĝin. Metu la tranĉitaĵojn en ĉi tiun sukcon. Aldonu malmulte da akvo, kaj kuiru, ke la la porkviando estu mola.

Dum la kuirado metu malmulte da salo kaj pipro. Laŭ via gusto. Surtabligu la manĝaĵojn kun varmaj nokoj.

\*\*\*\*\*

Alia recepto  
Farĉitaj brasikoj

Töltött káposzta

Forró vízben megpuhítom a káposzta leveleit. Megdarálom a disznóhúst, ami ne legyen túl zsíros. Összekeverem a megdarált húst rizzsel, hagymával, fűszerekkel (paprika, só, bors) és teszek hozzá egy kevés olajat. Ezt a keveréket teszem a levelekbe, és becsavarom azokat. Végül a betekert leveleket beleteszem a fazékba, és alacsony tűznél megfőzöm azokat. Közben paradicsomlevet töltök hozzá.

En varmega akvo mi moligas foliojn de brasiko. Mi muelas porkviadon, kiu ne devas esti tro grasa. Mi miksas la muelitan viandon kun rizoĵoj, cepoj, spicoj (papriko, pipro, salo), kaj mi metas al ili malmulte da oleo. Tiun miksaĵon mi metas en la foliojn, kaj tordas (becsavarom) ilin. Fine mi metas la torditaĵojn brasikfoliojn en la poton, kaj ĉe malaltigita (malforta) fajro mi kuiras ilin. Intertempe mi verŝas al ili tomatsukcon.

Mia patro preferas hungaran paprikitan, stufitan porkaĵon (perkelton), do mia patrino kuiras ĝin ofte. Al mi plaĉas la hungara kuirarto, do mi manĝas ĉion, kion mia patrino kuiras, fritas, bakas, rostas.

Mi finas mian mallongan leteron. Bedaŭrinde mi havas malmulte da libera tempo.

Skribu al mi pri viaj naciaj manĝaĵoj! Mi deziras al vi ĉion bonan.

Debrecen, la 6-an de septembro 2014

Ĝis revido!

Viktoria

## Levél (5.)

Írjon levelet sokoldalú hobbijáról!

- Hogyan és mire használja a számítógépét?
- Szeret dolgozni a kertükben.
- Érdeklődik a természetgyógyászat iránt.
- Régi kocsikat javít, újít fel.

---

Kara Petro!

Vi interesigis pri miaj hobiaj. Neniam mi enuas.

Ekde mia infanaĝo mi interesigas pri komputiloj. Tial mi lernas kaj studas komputteknikon. En mia libera tempo mi tre ŝatas konstrui (kompili) komputilojn, pliiĝustigi, ripari ilin. Ofte mi tralaboras tutajn noktojn. Kompreneble mi legas faklibrojn kaj gazetojn. Mi uzas interreton, kaj mi legas eĉ Esperantajn novaĵojn.

Krome mi ŝatas labori en nia ĝardeno. Mia hobiaj estas kultivi ornamkreskaĵojn, flegi ilin, tondi la herbojn, do beligi nian ĝardenon. Nature mi tre ŝatas, eĉ amas bestojn. Mi havas flavan papagon, kiu scipovas paroli. Mi havas hundon kaj tri katojn (unu nigran kaj du blankajn). Laŭ mia opinio la bestoj estas fidelaj kaj amindaj.

Mi interesigas pri ezoterio, naturkuracado. Mi finis kursojn de reikio, mi konas bone la cerbokontrolon, mi ŝatas horoskopojn, diversajn ŝtonojn kaj kuracherbojn. Laŭ mia opinio oni devas studi kaj koni la naturon, ĝiajn fortojn, kaj uzi ilin por si mem.

Mia plej granda „hobiaj” estas renovigo de malnovaj (tiel nomataj „old timer”) aŭtomobiloj. Mi tre ŝatas plezuri la belegan rezulton de mia laboro. Mi havas tri malnovajn aŭtojn, kaj ofte mi uzas ilin. Mi partoprenas konkurojn, kaj mi havas jam du orajn medalojn.

Skribu al mi, pri kio vi interesigas!

Debrecen, la 1-an de februaro 2014

Kun amikaj salutoj

Lacika

---

## Levél (6.)

Barátja vendégségbe hívja meg új lakásába. Írjon erről a látogatásról moszkvai ismerősének.

- Írja meg, hogy régi gyermekkori barátja meghívta önt otthonába!
- Írja le a lakását!
- Emelje ki, hogy barátjának hatalmas könyvtára van!
- Hasonlítsa össze az ön szerényebb, de igényesebben összeállított könyvtárával!
- Ön szerint milyennek kell lennie egy ideális házi könyvtárnak?

---

Kara Nataša!

Mi esperas, ke vi fartas bone en Moskvo fore de via patrujo. Imagu, ankaŭ mi vizitis eksterlandon. Mia malnova amiko, kun kiu mi konatiĝis dum miaj infanaj jaroj, invitis min al la itala urbo Rimini. Mi pasigis ĉe li sep tagojn.

Dume li prezentis al mi sian familian domon kun floriĝardeno. Lia domo apartenis al sia praavino, kiu estis itala grafino en la dekoka jarcento. Tiu domo estas ne simpla domo, sed grandioza kastelo. Ĝi konsistas el dudek ejoj; en la konstruaĵo troviĝas eĉ balejo, galerio, kie oni povas rigardi belegajn pejzaĝojn, grandvalorajn portretojn de famaj italaj pentristoj. Li havas bibliotekon kun dumil libroj. Lia libraro troviĝas en la norda parto de la kastelo. Ĝia tereno estas proksimume 70 kvadratmetra. Ĝi estas elegante ornamita kun pompaj lustroj, imponaj kurtenoj kaj ronda tablo farita el vitro kaj marmoro.

Sur la muroj pendas grandegaj bretoj, plenaj de famaj, raraj, malnovaj libroj. Ili estas kaj latinlingvaj, kaj itallingvaj. Ili estas valoraj, sed ne legeblaj. Kiu komprenas la latinan lingvon? Laŭ mia vidpunkto mia hejma biblioteko estas utiligebla. Ĝi enhavas nur famajn romanojn, enciklopediojn, manlibrojn, leksikonojn. Ofte mi uzas ilin dum mia hejma laboro, ekzemple, kiam mi pretigas min al miaj studhoroj, aŭ mi skribas mian hejman taskon.

Okaze de la Kristnasko mi deziras al vi multe da feliĉo kaj ĝojo.  
Mi atendas vian baldaŭan respondon.

Debrecen, la 2-an de decembro 2014

Kun amikaj salutoj

Petro

---

## Levél (7.)

Családja külföldi vendégeket vár vacsorára. Az ön feladata a vacsora elkészítése. Ezt és az alábbiakat írja meg ismerősének.

1. Mutassa be a meghívottakat. (Kik jönnek, honnan, hányan stb.)
2. Igazi magyaros ételekkel szeretné megvendégetni őket.
3. Állítsa össze a menüt.
4. Az egyik családtagjának eszébe jut, hogy a vendégek vegetáriánusok.
5. Az utolsó pillanatban a menüt teljesen meg kell változtatni.

---

Kara Anna!

Mi dankas vin por via longa letero, kiun mi ricevis pasintsemajne. Mi petas vian pardonon pro mia longa silento, sed mi ne povis respondi, ĉar mi estis treege okupita.

Je mia granda surprizo kaj ĝojo miaj geonkloj vizitos nin sekvontsemajne. Ili venos el la Usono, el Nevjorko por sep tagoj. Mi dezirus kuiri al ili hungarecajn manĝaĵojn. Ili estas bonhumoraj, modernaj kaj karaj geedzoj, tial mi tre amas ilin. Mi esperas, ke kun ili alvenos Helena, kun kiu mi renkontiĝis antaŭlonge. Ilia filino estas je du jaroj pli aĝa ol mi. Ŝi laboras kiel reĝisorino en granda usona filmfirmao „Universal”. Ekzemple ŝi reĝisoris la filmon, en kiu rolis Julia Roberts kaj Richard Gere. Ĝia titolo estas „Altera virino”.

Ege mi atendas ilin. Imagu! Mi aĉetis en la magazeno Plaza bovoviandon, muelitan porkviadon, diversajn legomojn, spicojn kaj fruktojn. Mi estus dezirinta kuiri bovoviandan supon kaj farĉitajn brasikojn. Mi antaŭmendis ruskreman torton. Mia patrino diris nur hieraŭ, ke la tuta familio estas vegetarana! Pro tio mi devis ŝanĝi la tutan manĝaĵaron. Mi kuiros fruktosupon el piroj, prunoj, fragoj, framboj, ĉerizoj, griotoj. Anstataŭ farĉitaj brasikoj mi gratenos fungojn. Ili povos manĝi ilin kun salato el diversaj legomoj: brasikoj, terpomoj, karotoj, brasikrapoj, laktukoj, bulboj ktp.

Mi esperas, ke miaj manĝaĵoj ekplaĉos al ili. En mia sekvonta letero post du semajnoj mi skribos al vi pri tio.

Miskolc, la 23-an de majo 2014

Estu gaja kaj feliĉa! Ĉion bonan dezirante

salutas vin  
via Enikő

---

## Levél (8.)

Győzze meg barátját (testvérét) arról, hogy ő is vegyen részt a házimunkában!

1. Sorolja fel, milyen házimunkák fordulnak elő általában otthon.
2. Van-e női és férfi munka, vagy ez téves megítélés?
3. Bízassa barátját (testvérét)! Javasolja, hogy mit és hogyan segítsen feleségének.
4. Érveljen a munkamegosztás fontossága mellett. Hogyan valósul meg ez az ön családi életében?

---

### Kara Teodoro!

Lastfoje en via letero vi plendis pri via edzino, ĉar ŝi postulis vian helpon en la hejma laboro. Mi devas aserti senindulge, ke via ĉarma edzino pravas.

Preskaŭ ĉiuj viroj pensas, ke virinoj devas purigi loĝejon, ŝuojn, polvosuĉi tapiŝojn, lavi vestaĵojn, telerojn, kuiri, friti, baki rosti, varti gefilojn, kudri, stebi. Viraj „taskoj” estas legado de gazetoj, ĵurnaloj, libroj, televidrigardado, trinkado de biero kaj hejma ripozado. Tio estas granda miskompreno!

Ne forgesu, ke via edzino ne estas servistino, kelnerino, hejma ĉambristino, ĝardenistino! Mi supozas, ke ankaŭ vi povas (scipovas, kapablas!) polvosuĉi, lavi telerojn, labori en via ĝardeno (akvumi kreskaĵojn, fosi, rasti, sarki ktp.)

En nia familio ekzistas labordivido ekde multe da jaroj. Mia edzo veturigas niajn gefilojn al la infanĝardeno (kaj matene kaj posttagmeze fine de sia laboro), li havas tempon por aĉetadi, laboreti en nia ĝardeno. Ofte li helpas al mi lavi telerojn, kaj ĉiam li estas kara, tolerema. Niaj gefiloj lavas siajn vestaĵojn memstare, purigas siajn ĉambrojn, du-trifoje semajne ili preparas al ni matenmanĝon.

Tiu labordivido helpas al ni havi pli multe da libera tempo, kiun ni povas pasigi kune. Ni vizitas kinejon, teatron, ekspoziciojn, ofte ni ekskursas. Tiu vorto „labordivido” povas helpi en la solvo de diversaj problemoj, faciligi, dolĉigi nian geedzan vivon.

Mi proponas al vi, ke ankaŭ vi helpu hejme. Tiel via vivo iĝos pli sentoriĉa, agrabla kaj tolerebla. Tion skribas al vi via fratino. Ne forgesu tion!

Transdonu miajn salutojn al viaj familianoj!

Debrecen, la 12-an de novembro 2014

Mi kisetas vin.

Kun koraj salutoj

Krisztina

\*\*\*\*\*

## Levélírási témák

1. Ön magyar turista, aki a berlini rendőrségen írásban feljelentést tesz. Írja le, hogy
  - most érkezett Berlinbe, és a vonaton ellopták a bőröndjét;
  - éppen akkor aludt;
  - egy gyanús fiatalember vihette el a bőröndjét, aki ugyanabban a fülkében utazott;
  - adjon róla személyleírást;
  - milyen holmik voltak a bőröndben?
  - kérjen gyors intézkedést;
  - adja meg a szálloda nevét, szobaszámát és az ön mobilszámát.

2. Ausztriában beiratkozott egy német nyelvtanfolyamra. Az első két nap után nincs megelégedve az oktatással. Írásban reklamáljon, és udvariasan kifogásolja a következőket:

- a tanárok halkán és gyorsan beszélnek;
- nem veszik tekintetbe, hogy középhasadós csoportról van szó;
- a teremben csak 18 fok a hőmérséklet, nincs normális fűtés;
- olyan sok házi feladatot adnak, hogy a napi nyolcórás tanulás mellett másnapra lehetlenség mindet megcsinálni;
- a kollégiumi szobában tízen vannak, nem tud rendesen pihenni és tanulni;
- kérje, hogy orvosolják panaszait.

3. Írjon német barátjának levelet.

- Hívja meg szülővárosába két hétre.
- Javasoljon több közös programot (városnézés, orgonahangverseny, séta, kirándulás a környékre stb.)
- Érveljen a hangverseny mellett: óriási az érdeklődés, híres énekesek lépnek fel, ismerősei is ott lesznek.
- Kérjen tőle egy szívességet (ajándékot).
- Írja meg, hogy kellemes meglepetésben lesz része.

4. Önnek már öt éve van jogosítványa. Angol barátja csak most szerezte meg.

- Barátja hosszabb külföldi útra akar indulni.
- Írja meg neki, hogy tapasztalt autóssá csak akkor válik, ha vezet, de nem hegyi serpentin erre a legjobb lehetőség. Először a városban gyakoroljon.
- Mindig ügyeljen a forgalomra, vigyázzon mások testi épségére, ne lépje át a megengedett sebességhatárt.
- Kérje, hogy fogadja meg tanácsait.

5. Írja meg német barátjának, hogy kéthónapos német ösztöndíjat kapott.

- Hamarosan indul Berlinbe.
- Ismertesse a részleteket (mivel és mikor érkezik, hol fog lakni, mit fog tanulni stb.).
- Sajnos nem lakhat a barátjánál, mert a cége fizeti a szállást egy kollégiumban.
- Javasolja, hogy találkozzanak. Kérje meg, hogy várja őnt a pályaudvaron.
- Kérdezze meg, milyen ajándékot szeretne kapni.

6. Hosszú külföldi tartózkodását megszakítva érkezett haza szabadságra. Csak itthon jutott eszébe, hogy elfelejtett elintézni egy fontos dolgot az adott országban. Azonnal ír egy ottani ismerősének.

- Közölje vele, mióta van itthon, hogyan utazott.
- Magyarázza el, mit felejtett el elintézni, milyen következménye lehet mulasztásának.
- Kérje meg ismerősét, segítsen elrendezni a dolgot. Részletezze, mi a teendője.
- Telefonon értesítse őnt, sikerült-e eljárni az ügyben.
- Majd viszonozza fáradozását. Tájékoztassa visszautazásának pontos idejéről.

7. Külföldi szomszédja hazautazott szabadságra. Levélben kérte őnt meg egy szívességre. Most levélben tájékoztatja arról, mit intézett.

- Érdeklődjön, milyen érzés volt hazatérni hosszas távollét után.
- Részletesen tájékoztassa, hogyan oldotta meg a problémát.
- Mit kell barátjának tennie, ha visszaérkezik? Mikor és mivel érkezik?

## 8. Panaszkodjon levelezőtársának.

- Az utóbbi néhány napon a szomszédban lakásfelújítást végeznek (fűrnak, korán kezdik a munkát, késő estig dolgoznak).
- Átment szomszédjához, és megnézte, hogyan csempézik a fürdőszobát.
- Megkérte a szomszédját, hogy a munkások reggel héttől este hatig dolgozzanak.
- Megígérte, de már ma sem tartották be az ígéretet.
- Vigasztalásul ön zenét hallgat, bömbölteti a CD-je hangszóróit.

## 9. Írjon levelet barátjának (saját neve és címe mellőzésével!), melyben beszámol családja mindennapi életéről.

- Mutassa be családja tagjait.
- Ki mivel foglalkozik általában?
- Hol laknak, milyen a lakásuk?
- Milyen közös családi programjaik vannak?
- Milyen gyakran vannak együtt?
- Milyen házimunka az ön feladata?
- Jól van ez így?
- Mit csinálna másképpen?

## 10. Írjon levelet arról, hogy miért tanulja az olasz nyelvet.

- Az olasz kultúra (irodalom, művészetek) iránti vonzalma miatt döntött így.
- Valaki (ismerőse, barátja) is befolyásolta.
- Véleménye szerint az olasz nyelvtudás Magyarországon idegenforgalmi szempontból fontos.
- Kedveli az olasz zenét (zeneszerzőket, operákat).
- Dallamossága miatt hasonlít az eszperantóra. Szókincsében is vannak azonosságok.

## 11. Írja meg külföldi barátjának, hogy egy közvélemény-kutató cég megbízásából egy áruházban a vásárlókat fogyasztói szokásairól kérdezi.

- Általában mindenki siet, ezért viszonylag kevesen vállalják a beszélgetést.
- Legtöbbször élelmiszert (kenyeret, felvágottat, tejet) vesznek.
- Az utóbbi időben minden árunak emelkedett az ára, de ez nem befolyásolja a fogyasztást.
- Sokan vesznek alkoholt, pedig káros a szervezetre.
- A megkérdezetteknek illatos szappant ad ajándékba.

## 12. Tanúnak idézik egy esemény kapcsán. Mesélje el levélben külföldi ismerősének, hogy

- mit látott, mikor, milyen körülmények között;
- mi a véleménye az esetről;
- hogyan és miért lett önből tanú;
- a bírósági tárgyalás hogyan zajlott le;
- milyen érzéseket váltott ki önből az eset.

## 13. Külföldi ismerőse érdeklődik, hogyan osztják be az otthoni munkát. Írja meg, hogy

- családjában milyen feladatokat osztottak meg egymás között;
- mi alapján történt a munkamegosztás;
- elégedett-e ön ezzel a munkamegosztással;
- mennyire szokásos Magyarországon az ilyen felfogás: mindenki segít mindenkinek.

- 14.** Német barátja tízéves kisfiával két napot szeretne Budapesten tölteni.
- Ajánljon nekik valamilyen programot.
  - A kisfiút nagyon érdeklik a kocsik (cirkusz, Halászbástya, Margit-sziget).
  - Sorolja fel a főváros nevezetességeit!
  - Ismertessen néhány éjszakai szórakoztató programot.
  - Írja meg, hol szállásolja el őket.
- 15.** Holland vendégénél tett látogatása után hazatért.
- Levélben köszönje meg a szívélyes fogadtatást.
  - Véleményét kérték egy dologról. A háziak elmondták, hogy az udvart be akarják ültetni virággal.
  - Javasolja, hogy feltétlenül hagyjanak szabad helyet gyermekeik számára, ahol játszhatnak, sportolhatnak. Ön szerint nem sok értelme van a kertes háznak, ha nincs lehetőség mozgásra.
  - Ott nem akarta ezt elmondani, nehogy megsértődjenek. Kérjen elnézést őszinte véleményéért.
- 16.** Igen fáradt mostanában. Írja meg ennek lehetséges okait barátjának.
- Munkahelyén sokkal többet kell dolgoznia. Indokolja meg, hogy miért.
  - Egyetemre jár, havonta kétszer van konzultáció, folyamatosan vizsgázik.
  - Szülei betegesek, rendszeresen gondoskodik róluk.
  - Nem eszik rendszeresen, pedig ez káros az egészségére.
  - Kérjen jó tanácsokat barátjától. Hogyan változtathatna életmódján?
- 17.** Német ismerőse hosszabb időre az ön városába érkezik dolgozni. Arra kéri, tájékoztassa őt, milyen lakásbérleti lehetőségek vannak.
- Ajánlja fel segítségét (hirdetést ad fel, ingatlanközvetítőt keres fel barátja nevében stb.).
  - Tájékoztassa arról, hogy a bérlőnek a rezsit is fizetnie kell (gáz, fűtés, villany, telefon, közös költség), ha valami elromlik, a javításokat is.
  - Írja meg a viszonylagos árakat (kétszobás lakás bérleti díja, összes rezsiköltség, fizetési szokások – havonta, több hónapot előre kell fizetni stb.)
- 18.** Két hónap múlva lesz az esküvője.
- Mutassa be vőlegényét/menyasszonyát.
  - Köszönje meg ismerősének a néhány nappal ezelőtt küldött jókívánságait.
  - Írja meg, hogy Velencébe mennek nászútra.
  - Utána egy ideig az ön szüleinél fognak lakni, de fél év múlva kész lesz a saját lakásuk.
  - Hívja meg ismerősét az esküvőre.
- 19.** Munkahelyet változtatott. Írja meg ismerősének,
- miben különbözik jelenlegi munkája az előzőtől,
  - milyenek az új kollégái,
  - milyen segítséget kap tőlük munkájához,
  - írjon új főnökéről,
  - mennyivel keres többet, mint előző munkahelyén,
  - milyen előrelépési lehetőségei lesznek,
  - szokott-e közös rendezvény (névnap, születésnap) stb. lenni.

20. Ĵrjon baráťjának/baráťnőjének kedvenc olvasmányáról.

- Miról szól a regény? Kik a főhősei? Jellemezze öket!
- Láťta már a regény megfilmesített változatát is. Miben tér el a kettő?
- Kérje meg baráťját, hogy írjon hasonló élményeiról.

\*\*\*\*\*

## Szövegértést ellenőrző feladatok

### 1.

#### La fino de Vincent van Gogh

Komence de julio 1890, Vincent van Gogh veturis la lastan fojon al Parizo por viziti sian fraton Theo, kiu jam dum pluraj jaroj finance kaj morale subtenis lin. Sed Theo kun sia edzino havis mem grandajn zorgojn. Lia fileto estis malsana, li bezonis monon kaj alian loĝejon kaj ne sciis, kiel li iros plu en sia profesia pozicio kiel artkomercisto en la entrepreno de Boussot kaj Valadon, kiuj arogante traktis lin kiel domserviston. Tial en la hejmo regis enorma tumulto. Vincent, kiu tie mem akceptis tro da diversaj pentristoj, estis konsternita de la situacio. Li reveturis laca kaj ekscitita al la vilaĝo Auvers-sur-Oise.

Tie li skribas en letero al la frato: „Post mia reveno ĉi tien mi estis ankoraŭ tre malĝoja kaj sentis ankaŭ sur mi mem la tempeston, kiu minacas vin”. Kaj en plia letero: „...Kaj tio estas ĉio, aŭ almenaŭ la plej grava, kion mi povas diri al vi en tiu sufiĉe kritika momento. En momento, kiam la rilatoj inter komercistoj kaj bildoj de mortaj artistoj, kaj komercistoj kun bildoj de vivantaj artistoj estas tre streĉaj. Kaj mia propra laboro, nu, mi riskas la vivon ĉe tio kaj mia menso je duono estas ekstermita. Sed vi, kiel mi scias tion, ne apartenas al la homkomercistoj, kaj vi povas, kiel mi scias, defendi konvinkon kaj agi vere humane – sed kion oni faru?”

Spite al sia malespero Vincent laboras plu. Li pentras kvar grandformatajn bildojn, unu el ili estas la „Korvoj super la tritikokampo”, kiun li pentris de la 7a ĝis la 10a de julio en 1890. Kion tiu morna bildo kaj multaj aliaj antaŭsignoj jam lasis diveni, okazis je la 27a de julio de la sama jaro; tamen neatendite por ĉiuj, kiuj kontaktis kun Vincent.

Emile Bernard al Albert Aurier: „Efektive li iris dimanĉe vespere al la rando de Auvers, metis sian pentristan stablon apud fojnostako kaj tiam pafis sin. Trenata de la skuiĝo, li falis teren (la kuglo penetris lian koron), sed li tamen stariĝis por reiri al la gastejo, kie li loĝis”.

Adeline Ravaux [ravó], posedanto de la gastejo: „Ni staris antaŭ la dompordo por kapti iom da freŝa aero, kiam ni fine vidis lin veni; senvorte, kiel ombro, li preteriris nin. Per grandaj paŝoj li iris tra la gastejo supren, en sian ĉambbron. Estis jam sufiĉe malhele, kaj nur mia patrino rimarkis, ke li aspektis kvazaŭ spertanta grandan doloron. Tuj poste ŝi diris al mia patro: „Rigardu, mi supozas, ke sinjoro Vincent fartas malbone”. Mia patro iris supren. Li aŭdis ĝemojn. Ĉar la ŝlosilo troviĝis en la seruro, li eniris. Sinjoro Vincent kuŝis sur la lito. Li montris sian vundon kaj diris, ke li esperas, ke ĉi-foje la pafado ne preteriris”.

Oni vokis la lokan kuraciston kaj lian amikon, doktoron Gachet [gaŝé]. La kuracisto pansis lin, sed ne povis forigi la kuglon. Vincent sidis la tutan tagon en la lito kaj fumis sian faman pipon. Li mortis en la matenaj horoj de la 29a julio, ĉeeste de sia affliktita frato Theo, al kiu Vincent verŝajne volis helpi per sia memmortigo, ĉar ja la bildoj de *mortintaj artistoj* pli bone vendiĝas, ol tiuj de vivantaj. La bonkora Theo, kiu tre amis sian fraton, tenis lian manon kaj

aŭskultis liajn lastajn vortojn: „Mi dezirus, ke mi povu tiel morti!” Vincent van Gogh havis nur 37 jarojn, kiam li mortis. Gachet desegnis lin, kuŝantan en la mortlito.

Ĉar la katolika pastro de Auvers ne volis disponigi la mortulĉaron por memmortiginto, oni prizorgis ĝin el la najbara komunumo. Oni entombigis Vincent-n en la tombejo de Auvers, alte super la tritikaj kampoj.

---

### **1. Miért nem tudott segíteni testvérén Theo?**

Theo feleségével együtt korábban támogatta a festőt, de fiuk beteges volt, ezért Theonak pénzre és másik lakásra volt szüksége. Bizonytalan volt kereskedői vállalkozásának folytatása is.

### **2. Hogyan vélekedett a Vincent van Gogh kortársainak munkáiról?**

Vincent elfogadta a különböző festőművészek megdöbbentő alkotásait.

### **3. Hogyan folytatta munkáját? Hány képet festett? Melyik a leghíresebb?**

Vincent nem esett kérttségbe és folytatta munkáját. Négy nagyalakú képet festett, egyik közülük „Varjú a búzamezők felett”, melyet 1890. július 7-10. között készített.

### **4. Írja le a festő öngyilkosságának részleteit!**

Elment az Auvers partjára, maga mellé tette festőállványát, és mellbe lőtte magát. A földre esett (a golyó a szívét érte), de mégis felállt, és visszament a vendéglőbe, ahol lakott.

### **5. Hogyan mesélte el a vendéglő tulajdonosa az esetet?**

„Kint álltunk a ház ajtajában friss levegőt szívni. Amikor megláttuk, szótlantul, szinte árnyéként haladt el mellettünk. Nagy léptekkel ment fel a szobájába. Már elég sötét volt, és édesanyám megjegyezte: úgy véli, hogy Vincentnek nagy fájdalmai vannak. Apám felment az emeletre. Nyögéseket hallott. A kulcs a zárban volt. Vincent úr ágyban feküdt. Megmutatta a sebet.”

### **6. Mit mondott a festő a vendéglősnek sebével kapcsolatban?**

Azt mondta, reméli a lövést nem vétette el.

### **7. Mit csinált az orvos a sebbel?**

Az orvos bekötözte a sebet, de a golyót nem tudta eltávolítani.

### **8. Hogyan segített a festő testvérén és családján?**

Testvérét elszomorította, hogy Vincent egyedüli megoldásként öngyilkosságával tud segíteni, mert egy halott művész képei jóval többet érnek mint egy élőé.

\*\*\*\*\*

## **2.**

## **Kalocsay kaj Baghy en Ĉinio**

Ekde la 20-aj jaroj ĉinaj esperantistoj ekprezentis alilandajn literaturaĵojn, precipe la orienteŭropajn, al ĉinaj legantoj per Esperanto.

En januaro 1929 Lusin kiel redaktoro de la gazeto Torento ricevis kontribuaĵon kun letero de iu nekonata junulo Sun Yong, kiu samtempe informis Lusin, ke li ĉinigis fabel-epopeon de Petőfi Sándor, Johano la Brava, el la esperanta traduko de Kálmán Kalocsay. Sun Yong petis helpon por eldoni sian tradukon. Lusin tuj respondis: "Se vi povas sendi la tradukitan

epopeon, eble mi publikigos ĝin en la gazeto. Eldono nur en libra formo estas tre malfacila, ĉar nun legantoj de poemoj estas nemultaj kaj pro tio eldonejoj ne interesiĝas. Sed mi povas demandi al Beixin-Librejo, kaj se ĝi volos akcepti, tiam mi sciigos vin kaj vi povos rekte trakti kun ĝi."

Lusin mem tre ŝatis Petőfi, kelkfoje verkis pri ties vivo kaj verkado en siaj eseoj, eĉ propramane ĉinigis ses poemojn de Petőfi el la germana lingvo. Ricevinte la tradukojn, Lusin klopodis por ilia eldono. Li deziris, ke la ĉinaj legantoj povu ĝui la belajn versojn en bela prezento, eĉ skribis leteron al amiko studanta en Germanio por aĉeti eldonon kun ilustraĵoj. Dume li ankaŭ proponis al Sun Yong: "Ĉu ĉe via flanko troviĝas ebleco aĉeti tian eldonon kun ilustraĵoj pere de esperantisto en Hungario?" Sun Yong tuj ekkorespondis kun Kalocsay, la esperantiginto, kiu tre ĝojis akcepti la peton. Post serĉada strebo li sendis al la ĉinigitino 12 belajn kolorajn bildojn.

Lusin estis ravita. Li eĉ intencis represi laŭ la originaloj kolore, tamen la tro altan koston neniu eldonejo volis akcepti. Poste li turnis sin al gazeto kun propono de trikolora preso, kies kliŝojn li povus prunti por libroforma eldono; tion la gazeto rifuzis. Tiam eĉ Beixin-Librejo perfidis sian promeson eldoni la epopeon, pro timo de malprofito. Lusin kolere skribis al Sun Yong: "Eldonejoj ĉesas profiton, kio kaŭzas, ke al Ĉinio mankas bonaj libroj."

Lusin decidis per propra financo eldoni la epopeon je mil ekzempleroj kaj ofsete represi la bildojn. Fine malgranda eldonejo Hufeng-Librejo konsentis eldonon de la libro, postulante nur ke Lusin antaŭpagu por kliŝfarado kaj honorario al la tradukinto. Lusin konsentis tion. Post klopodado de jaro kaj duono la fabelo de Petőfi aperis antaŭ la ĉinaj legantoj.

Dum la korespondado kun Kalocsay, Sun Yong akceptis lian peton helpi pri la esperantigo de poemoj de Li Bai, la granda poeto de la Tang-dinastio. Sun detale klarigis al Kalocsay la enhavon kaj propran metrikon de elektitaj poemoj. Tiu kunlaboro trans landlimoj postlasis valoran beletran heredaĵon en la Esperanta kulturo: sep poemoj de Li Bai aperis unue en Literatura Mondo, poste en la poemaro Eterna Bukedo. Aliflanke Sun Yong ĉinigis poemojn de Petőfi el la tradukoj de Kalocsay, kiuj en 1951 en Pekino aperis kiel 40 poemoj de Petőfi. Poste, dank'al du hungaraj studentoj, kiuj studis en Pekina Universitato, Sun Yong ĉinigis pli ol cent poemojn de Petőfi, eldonitajn en la libro Poemoj de Petőfi (Pekino, 1959).

Bakin, fama ĉina verkisto, ekiris sur la literatura vojo per tradukoj el Esperanto. Post sia esperantistiĝo en 1924 li ĉinigis verkojn de E. Amicis, L. Tolstoj kaj Akita Ujaki el Esperanto; nur en 1927 li verkis sian unuan romanon, Pereo. Kiam en 1931 aperis la romano de Julio Baghy Printempo en la aŭtuno, ĝi tuj kaptis la animon de la juna Bakin, kiu publikigis ĉinan tradukon jam en 1932 ĉe Kaiming-Librejo, Shanghai. La koincidoj estas interesaj: Baghy verkis la romanon en unu semajno, Bakin tradukis ĝin en unu semajno, kaj ankaŭ en unu semajno en 1932 li verkis propran romanon sub ĝia influo, Aŭtuno en la printempo.

La romano de Baghy rapide havis fortan eĥon ĉe la ĉina legantaro, precipe la junularo. De 1932 ĝis 1981 tiu romano estis represita 17-foje. Multaj uzis kaj uzas ĝin por ellerni Esperanton kaj la tradukarton.

La granda hungara ĝemelstela paro Baghy kaj Kalocsay multe kunlaboris al nia Esperanta kulturo, sed ankaŭ sur la paĝoj de la ĉina literaturo estas gravurita ilia merito.

\*\*\*\*\*

#### Válaszolja magyarul a kérdésekre:

1. Ki Lusin? Életművében milyen szerepe volt Petőfinék és mit tett, hogy Kínában megismerjék Petőfit? (7 pont)
2. Mit fordított le Sun Yong? (2 pont)
3. Sun Yong nem tudott magyarul. Hogyan értette meg Petőfi műveit? (4 pont)
4. Mit küldött Kalocsay Sun Yong-nak? (2 pont)
5. Mit kért Kalocsay Sun Yong-tól, mi lett az együttműködés eredménye? (4 pont)
6. Baghy Gyula regénye hogyan hódította meg fordítóját és kínai közönségét? (6 pont)

\*\*\*\*\*

## MEGOLDÁS

### 1. Ki Lusin? Életművében milyen szerepe volt Petőfinek és mit tett, hogy Kínában megismerjék Petőfit? (7 pont)

- a Torento c. lap szerkesztője;
- nagyon szerette Petőfit / esszéiben írt Petőfi életéről és műveiről
- néhány versét lefordította németből
- küzdött a János vitéz kiadásáért, saját költségén rendelte meg egy kiadónál

### 2. Mit fordított le Sun Yong? (2 pont)

- számos Petőfi-verset
- a János vitézt

### 3. Sun Yong nem tudott magyarul. Hogyan értette meg Petőfi műveit? (4 pont)

- Kalocsay eszperantó nyelvű fordításai alapján
- két Pekingben tanuló magyar diák segítségével

### 4. Mit küldött Kalocsay Sun Yong-nak? (2 pont)

- 12 színes illusztrációt

### 5. Mit kért Kalocsay Sun Yong-tól, mi lett az együttműködés eredménye? (4 pont)

- segítsen Li Bai műveinek fordításában / Sun Yong elmagyarázta a kiválasztott versek tartalmát és metrumát
- hét vers megjelent a LM-ban, majd egy gyűjteményes kötetben

### 6. Baghy Gyula regénye hogyan hódította meg fordítóját és kínai közönségét? (6 pont)

- Bakin egy hét alatt lefordította, majd hatása alatt maga is megírta regényét
- 1932 és 1981 között 17 kiadása jelent meg
- sokan nyelvtanulás miatt olvassák, mások pedig a fordítás művészetét akarják belőle megtanulni

\*\*\*\*\*

## 3.

### Mia profesio estas stenografo

„Ĉu vere stenografo? Ĉu tiu ĉi profesio ankoraŭ ekzistas? Kial oni ne uzas sonbendon?”

Multaj homoj ne kredas, ke junuloj hodiaŭ elektas tiun ĉi profesion. Kaj ili eĉ pli miras, kiam ili ekscias, ke stenografoj ne estas malbone pagataj „tajpistaĉoj”, sed bone instruitaj specialistoj, kies ŝancoj sur la labormerkato estas elstaraj.

Nur ĉirkaŭ 200 virinoj kaj viroj en Germanio laboras kiel „parlamentaj kaj debataj stenografoj”. Proksimume 25 el ili estas oficistoj de la Germana Federacia Parlamento, kies Stenografa Servo estas la plej laborkapabla kaj rapida en Germanio.

Ĉiam du stenografoj skribas samtempe ĉe sia tablo en la plenkunsido, kiu staras rekte antaŭ la oratora pupitro. Tie ili sidas vidalvide al la parlamentanoj kaj notas ne nur la paroladojn, sed ankaŭ elementojn de la debato, pri kiuj sonbendo ne informas: kiu aplaŭdas, kiu – kompreneble sen mikrofono – faras kiujn interrompajn rimarkojn?

La plej gravaj iloj tradicie estas skribilo kaj papero. Stenografi-tajpiloj neniam estis multe uzataj en germanlingvaj landoj. Avantaĝo de la tradicia manskriba stenografio estas, ke oni ne bezonas multekostajn ilojn por lerni ĝin kaj povas uzi ĝin ĉie. Skribilo kaj papero sufiĉas por fari notojn en lernejo aŭ universitato aŭ dum telefonado – aŭ simple por skribi aĉetliston.

Tradicie oni lernas tiun ĉi arton en lokaj stenografaj asocioj. Ankaŭ kelkaj gepatroj instruas ĝin al siaj infanoj. La parlamentoj do ne devas instrui la bazajn sciojn. Por eklabori en la Federacia Parlamento oni jam skribu almenaŭ 200 silabojn po minuto. Dum la trejnado en la parlamento oni plirapidiĝas al pli ol 300 silaboj. Komparu: per normala manskribo oni atingas nur 40 aŭ 50 silabojn.

Kromaj postuloj por tiu ĉi profesio estas bonega regado de la germana, kapabloj de rapida konceptado kaj intereso pri politiko. La stenografoj de la Federacia Parlamento krome ĉiuj finstudis ĉe universitato en diversaj fakoj.

La stenografado estas nur la komenco de la laboro. La ĉefa parto okazas en la oficejoj, kie ĉiu stenografo surpaperigas helpe de komputilo sian eron de la debato. Li kontrolas la skribmanieron de nomoj, de personoj kaj asocioj, de leĝoj kaj dekretoj. Li korektas lang-

erarojn kaj gramatikajn erarojn. Neniu atendas, ke la parlamentanoj, kiuj antaŭe nur notis kelkajn vortojn, faras pres-pretajn paroladojn. Parolado libera malsamas al skriba argumentado. Sed legantoj volas facile legeblan tekston. Tial la stenografo devas atente prilabori ĝin sen ŝanĝi la stilon aŭ eĉ la sencon. Por bone surpaperigi 5-minutan debateron oni bezonas ĉirkaŭ 50 minutojn.

Dua stenografo, nomata „revizoro”, kontrolas la tajpitan tekston kaj sendas ĝin al la parolinto, kiu dum du horoj rajtas postuli korektojn, se io malĝustas. Sed veraj eraroj maloftas. Poste la stenografo metas la protokolon en la interreton\*. Presita versio pretas je la mateno de la sekva labortago.

Krom la dungitaj stenografoj en la federacia kaj la landaj parlamentoj ekzistas ankaŭ memstaraj stenografoj, kiuj faras protokolojn de partiaj aŭ sindikataj kunvenoj, de kongresoj, procesoj kaj tiel plu.

\* *interreto: internet*

---

Válaszoljon magyarul a kérdésekre:

1. Miért lesz napjainkban valaki gyorsíró? (2 pont)
2. A Német Szövetségi Parlamentben hol van a gyorsírók helye, mit jegyeznek le? (6 pont)
3. Melyek a gyorsírók legfontosabb munkaeszközei? (1 pont)
4. Milyen előnyökkel jár használatuk? (4 pont)
5. Milyen követelményeknek kell megfelelniük a Szövetségi Parlament gyorsíróinak? (6 pont)
6. A jegyzetelés után mi még a gyorsírók és ellenőrök feladata? (6 pont)

---

## MEGOLDÁS

1. Miért lesz napjainkban valaki gyorsíró? (2 pont)
  - mert jól megfizetik és jól képzett szakember / megbecsült, nagy presztizsű foglalkozás / a munkaerőpiacon kiváló helyzete van
2. A Német Szövetségi Parlamentben hol van a gyorsírók helye, mit jegyeznek le? (6 pont)
  - az üléssteremben
  - a szónoki emelvény előtt
  - szemben a képviselőkkel
  - saját asztaluk van
  - (nemcsak) a beszédek
  - a vita olyan elemeit (is), amelyekről a hangfelvétel nem ad információt (ki tapsol, ki tesz megjegyzést)

3. Melyek a gyorsírók legfontosabb munkaeszközei? (1 pont)
  - papír és írószer
  
4. Milyen előnyökkel jár a használatuk? (4 pont)
  - a tanuláskor nincs szükség drága felszerelésre
  - bárhol lehet használni
  
5. Milyen követelményeknek kell megfelelniük a Szövetségi Parlament gyorsíróinak? (6 pont)
  - percenként (legalább) 200 / 200-300 / több mint 300 szót tagot kell tudni leírni
  - kiválóan kell tudni németül
  - gyors fogalmazási készség
  - politikai érdeklődés
  - egyetemi végzettség
  
6. A jegyzetelés után mi még a gyorsírók és ellenőrök feladata? (6 pont)
  - (számítógéppel) papírra teszik / átírják a jegyzeteiket
  - ellenőrzik a helyesírást (nevek, törvények, stb.)
  - javítják a beszélő nyelvtani hibáit, nyelvbotlásait / élvezhető olvasmánnyá alakítják a beszédet
  - elküldik javításra a szónoknak
  - felteszik az internetre a jegyzőkönyvet

\*\*\*\*\*

## 4.

### Parolas Pekino

La 19-an de deembro 1964 eksonis voĉo de ĉinaj esperantistoj “Parolas Pekino” – la signalo de la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino (nun ĈRI: Ĉina Radio Internacia). Komence ĝi okazis unu fojon semajne, nur al Orienta Eŭropo; nun kvar fojojn ĉiutage, respektive al Eŭropo, Orienta Azio, Sudorienta Azio kaj Latinameriko.

ĈRI estas ŝtata radio, kiu sin disaŭdigas al la tuta mondo en kvardek tri lingvoj. La Esperanto-sekcio raportas pri la reformoj kaj grandegaj ŝanĝiĝoj, gravaj atingoj de Ĉinio, konigas pri la longa historio, brila kulturo, riĉa literaturo kaj arto, diversaj moroj kaj kutimoj de Ĉinio. Ili rakontas ankaŭ pri la historio kaj nuna stato de la Esperanto-movado en Ĉinio kaj aliaj landoj. Germana aŭskultanto skribis: “Mi ĉiam fidele kaj plezure aŭskultas vian disaŭdigon, kiu estas ne nur mia sprita ĝuo, sed ankaŭ grava kurso por lerni la ĉinan historion. Via disaŭdigo ege riĉigis mian scion, tiel ke mi ekhavis la fortan deziron: nepre vojaĝi al via lando...” Tiu aŭskultanto partoprenis la 71-an Universalan Kongreson okazinta en Pekino en 1986 kaj fine realigis sian deziron.

Iama prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Usona profesoro Humphrey Tonkin laŭdis en sia disertacio pri Esperanto-disaŭdigo, ke la fonetika kvalito de Pekina Radio estas bona kaj meritas esti modelo de Esperanto-disaŭdigo por la tuta mondo. Iama ĝenerala sekretariino de UEA, hungara doktorino Flóra Szabó-Felső diris en iu prelego, ke la Esperanto-disaŭdigo de Pekino faris gravan kontribuon por diskonigi informojn pri Ĉinio, por propagandi la ĉinan kulturon, kaj plie, por apliki Esperanton en ĵurnalisma fako.

La Esperanto-disaŭdigo de ĈRI estas ĉiam amata de diverslandaj aŭskultantoj. Iuj el ili eĉ

organizas aŭskultantan grupon aŭ klubon, en kiu ili faris multe da laboro por interligi aŭskultantojn. Kelkaj aŭskultantoj okazigis ekspoziciojn; aliaj surbendigis la programerojn, kaj tiel la programoj de ĈRI fariĝis lerno-materialoj de multaj aŭskultantoj. Ankoraŭ pli multaj aŭskultantoj afable sendis gazetojn, ĵurnalojn, librojn, diktafonojn, kasedojn kaj diskojn por riĉigi la disaŭdigon.

La Esperanto-sekcio de ĈRI estas laŭdata ankaŭ de la estraro kaj kolegoj de la radio pro sia elstara laboro. Ĝi estas honorita plurfoje kiel avangarda sekcio, kaj ĝiaj programeroj multfoje gajnis premiojn.

\*\*\*\*\*

**Válaszoljon magyarul a következő kérdésekre:**

**1. Milyen változások történtek a kínai esperantó nyelvű rádióadásban?  
(nevében, adássűrűségében, sugárzási területében) (9 pont)**

**2. Hány nyelven sugároznak, melyek az esperantó nyelvű adás témakörei? (4 pont)**

**3. A fentiekén kívül mit tart fontosnak az UEA egykori főtitkára? (2 pont)**

**4. Mire készítették az adások egyik hallgatójukat, és hogyan valósult meg kívánsága? (2 pont)**

**5. Az UEA egykori elnöke miért dicséri a ĈRI adásait? (2 pont)**

**6. A hallgatók milyen tevékenységekkel kapcsolódnak a rádióhoz? (3 pont)**

**7. Hogyan ismerték el a kollégák és a rádió vezetősége az esperantó szekció munkáját? (3 pont)**

\*\*\*\*\*

## 5.

### Pri la revuo "Kontakto"

La Esperanta revuo "Kontakto" estas eldonata ĉefe por junulara publiko, kaj enhavas artikolojn pri diversaj temoj el la tutmonda, socia, kultura kaj arta vivo.

Ĝi aperas sesfoje jare, kaj ĝi estas legata en ĉirkaŭ naŭdek landoj. Individuaj membroj kaj patronoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (mallonge TEJO), ricevas "Kontakton" aŭtomate, sed eblas ĝin ankaŭ aboni. "Kontakto" estas aparte celata por insturistoj kaj komencantoj. Ĝuste pro tio parto de la artikoloj aperas en lingvaĵo facila, kaj tre facila; tio signifas kun limigita kvanto de vortoradikoj. Ĝenerale la revuo traktas plej diversajn temojn, ekzemple, politikon, historion, hobiojn, vojaĝojn kaj tiel plu.

Kutime ĉiu numero de "Kontakto" havas sian apartan temon aŭ emfazon, sed en ĉiu numero aperas ankaŭ alitemaj materialoj.

Oni notu tamen, ke ĝi ne estas primovada revuo, tial la raportoj pri diversaj Esperanto-aranĝoj, kutime ne estas publikigataj.

Kontakto nun serĉas novan redaktoron. Laŭ la anonco la taskoj de la redaktoro estas: elekti la ĉeftemojn, teni kontaktojn kun kontribuantoj kaj instigi ilin al verkado, kaj eventuele mem verki aŭ intervjui. Lian laboron helpos grafikisto, kiu respondecas pri la aspekto de la revuo. La redaktoro devas labori en sia hejmo, ĉar ne ekzistas aparta oficejo. La anonco ankaŭ diras, ke la redaktoro de Kontakto estu persono, kiu kun plezuro laboras per la lingvo.

Ŝi/li havu altan lingvonivelon en Esperanto. Akurata laborstilo, respekto de limdatoj, ĝustatempeco kaj elteno de laborintensaj periodoj estas kondiĉoj por sukcesa laboro. Ŝi/li havu bonan konon de la Esperanto-movado, kaj estu atenta observanto de mondaj kultura vivo kaj eventoj.

Kvankam ne estas nepraj kvalifikoj, tamen donas avantaĝon spertoj, akiritaj pli frue, kiel redaktoro aŭ ĵurnalista, nacilingve kaj/aŭ Esperante. Oni devas sendi vivresumon, motivigleteron kaj ekzemplerojn de antaŭaj verkoj, artikoloj, redaktitaj revuoj kaj tiel plu al la oficejo de TEJO ĝis la dekvina de junio dumil dek.

\*\*\*\*\*

**Válaszoljon magyarul az alábbi kérdésekre:**

1. Milyen gyakran jelenik meg és kb. hány országban olvassák a folyóiratot? (2)
2. Hogyan lehet hozzájutni a folyóirathoz? (2)
3. Milyen olvasóközönséget céloz meg a „Kontakto”? (2)
4. Milyen témákról van benne szó? (4)
5. Milyen legyen az új szerkesztő? (5)
6. Mi a szerkesztő fő feladata? (5)
7. Mit kell beküldeni a jelentkezőknek és meddig? (5)

\*\*\*\*\*

## 6.

### PRI JOHN BAŬER

John Baŭer naskiĝis en Jönköping en 1882. En tiu tempo la urboj estis malgrandaj kaj la arbaroj estis grandaj en Svedio.

Plaĉis al John vagadi en la arbaroj. Li plukis en siajn poŝojn ĉion: florojn, muskon, strangaspektajn ŝtonojn kaj stangetojn, kiujn li hejme desegnis.

En la profundaj arbaroj loĝis la troloj (*manók, koboldok*). Ili estas brunaj kaj verdaj kiel la arbaro mem. Granda ŝtono kun musko povus esti la kurba dorso de trolo.

John ne estis diligenta lernanto. Kontraŭe. Li dediĉis sin al desegnado de komikaj portretoj de siaj instruistoj en la matematika kalkulkajero. La samklasanoj ridis pro la desegnoj, sed la instruistoj malŝatis ilin.

16-jara li finis la lernejon kaj transloĝiĝis al Stokholmo, kaj tie li eniris pentrolemejon. Baldaŭ oni povis vidi desegnojn de John Baŭer en gazetoj, kaj kiam li havis 19 jarojn li ilustris siajn unuaj fabelojn.

John vojaĝis al diversaj landoj, pentris kaj fariĝis pli sperta pentristo. Li edziniĝis al kurskamarado, kiu nomiĝis Ester. Ili ekloĝis en domo ĉe la lago Bunn en Smolando.

Estis ŝi, kiu pozis kiel modelo por preskaŭ ĉiuj liaj bildoj de fabelaj princinoj.

Oni multe laŭdis John pro siaj fabelaj pentraĵoj, tamen li imagis, ke la homoj malŝate rigardis lin, la pentriston, kiu pentris fabelojn.

Tial li intencis transloĝiĝi de Smolando al Stokholmo. Lia edzino ja ankaŭ pentris kaj en Stokholmo ambaŭ havus eblecon evoluiĝi, kaj tie John finus pentri trolojn.

Vespere la 22-an de novembro 1918 li enŝipiĝis sur "Per Brahe" en Gränna kun sia 3-jara filo. La ŝipo havis pezan ŝarĝon – kudromaŝinojn de Huskvarna kaj bokalojn da fruktmarmelado de Gränna. Ŝtormegis, sed tamen la ŝipo komencis la vojaĝon kaj direktis sin norden sur la lago Vättern.

Ili neniam atingis havenon. En la malhela nokto en la forta vento la ŝipo renversiĝis kaj iris al la fundo de la lago. Ĉiuj dronis.

Kelkaj personoj interpretis la katastrofon tiel, ke estis la troloj kiuj volis retenigi John Baŭer en Smolando kaj per helpo de la nikso ili sukcesis.

\*\*\*\*\*

Válaszoljon magyarul az alábbi kérdésekre:

1. Mit gyűjtött J. Bauer az erdőben és mit csinált vele? (6 pont)

2. Milyen színűek voltak a koboldok? (2 pont)

3. Milyen tanuló volt John és mit csinált az iskolában? Hogyan viszonyultak ehhez osztálytársai és tanárai? (4 pont)

4. Mit csinált 16 éves korában? (4 pont)

5. Mi volt felesége foglalkozása? (1 pont)

6. Mi történt 1918. november 22-én? (8 pont)

\*\*\*\*\*

## 7.

### La boatisto

Ĉi-loke la rivero estis malrapid-flua. La boatisto ĉiutage aŭrore aliris la bordon. Tiam ankoraŭ ne estis pasaĝeroj; li haltis antaŭ sia domo, rigardis unue supren al la kurbiĝo, poste suben, al la alia kurbiĝo de la rivero.

La urbo estis malproksima, la unuaj pasaĝeroj alvenadis antaŭtagmeze. Iuj perpiede, iuj bicikle. Kun pakaĉoj surdorse ili iris al la vendoplaco de la urbo.

La grandan boaton antaŭ nelonge konstruis la boatisto mem, kaj bone konis ĝin – ĉiun ĝian movon, kutimon li konis. Neniam li lasis la boaton subsune. Ĉiam li ligis ĝin al ombroj domaj arbegoj bordaj.

La homoj en tiu provinco estis malmultvortaj. Ili havis sunbrunigitajn haŭton, rapidemajn piedojn, kaj neniam ili iris kun malplenaj manoj. Portis ili korbojn, sakojn, puŝis biciklojn aŭ ĉareton. La boata vojo daŭris nur kelkajn minutojn. La rivero ĉi tie ne estis larĝa.

Kontraŭborde sur ŝtona kolono pendis peco de relo kaj alĉenigita fero. Se alvenis iu pasaĝero, li devis gongi. La bruo sonis malproksimen super la akvo.

Dum fluo de jaroj la boatisto spertis la sonojn. Jam rekonis la gongadon de certaj konstantaj pasaĝeroj.

La pasaĝeroj tri jarojn pli frue la unuan fojon menciis la ponton. Ili rakontis, ke la estraro decidis: estu ponto inter la du bordoj, kiu konligu ilin! Poste diris la pasaĝeroj: rande

de la urbo oni jam eĉ signis la lokon de la ponto. Printempe, somere ĉiu pasaĝero menciis la ponton.

Oni jam konstruas al la ponto novan vojon. Aŭtune alvenis per aŭte du viroj, nigre vestitaj. La boatisto suspekteme rigardis ilin. La urbanoj estis oficistoj, kaj pridemandis lin. “Kiom da jaroj vi havas? Ekde kiam vi estas boatisto? Ĉu la boato apartenas al vi?”

Unu el la oficistoj notis ĉion sur papero. Poste ili diris: ”Nu, sinjoro boatisto, alvenis la tempo. Baldaŭ vi povos fini la boatadon, vi ricevos pension.”

“Jes, ja, printempe la ponto estos preta. Mi jam ne estos bezonata, mi povos ripozi.”

\*\*\*\*\*

1. Milyen volt a folyó? (1)
2. Mikor és hová ment a révész minden nap? (2)
3. Hová kötötte ki a csónakját? (3)
4. Hogyan érkeztek az utasok? (3)
5. Hová igyekeztek az utasok? (2)
6. Mi jellemezte a vidéki embereket? (8)
  
7. Hogyan jelezték az utasok, ha megérkeztek az átkelőhelyhez, és nem volt ott a révész? (2)
  
8. Miért épült a híd? (1)
9. Mit kérdeztek a révésztől a hivatalnokok? (3)

C 1

# FELSŐFOK

- I. Tesztfeladat** **15 pont**  
**Szótár nélkül (30 perc). Minimum nincs**  
\*\*\*\*\*
- Szótárral II., III., IV., V. (240 perc)**
- II. Magyar szöveg tömörítése** **20 pont**  
**eszperantóul**
- III. Fordítás eszperantóról magyarra** **20 pont**  
**KÖZVETÍTÉSI KÉSZSÉG. MIN. 16 PONT**  
\*\*\*\*\*
- IV. Fogalmazás (levélírás)** **20 pont**  
**ÍRÁSKÉSZSÉG. MIN. 8 PONT**  
\*\*\*\*\*
- V. Szövegértés ellenőrzése** **25 pont**  
**OLVASÁSI KÉSZSÉG. MIN. 10 PONT**  
\*\*\*\*\*
- Összesen:** **100 pont**

# KOMPLETT FELADATSOR

## I. Tesztfeladatok megoldása

**Elérhető pontszám: 15**

1. Mi ne scias, kio okazis...  
A) al mi                      B) kun mi                      C) per mi                      D) ol mi
2. Niaj geamikoj vizitis .... muzeon.  
A) en la                      B) -                      C) al la                      D) granda
3. Tiu sinjorino, kiun mi vidis ĉe la angulo, ŝajnis tre ...  
A) al bela                      B) bela                      C) belan                      D) bele
4. Mi ne ŝatas ..... kokinojn.  
A) senplumiĝi                      B) senpulmiĝi                      C) senplumigi                      D) senplui
5. Li laboras ...  
A) kiel sunfloro                      B) kiel leporo                      C) ol instruisto                      D) kiel ŝoforo
6. ... vespero estos tre agrabla.  
A) tio                      B) tiom                      C) ties                      D) tiu
7. Mi ŝatas ... terpomojn.  
A) senŝeliĝi                      B) senŝeli                      C) senŝeligi                      D) senŝajn
8. ... la glasojn!  
A) plenigu                      B) plenu                      C) plenumu                      D) plene
9. Mi ŝatas manĝi...  
A) makaronojn                      B) makaroniojn                      C) makaronon                      D) makraĵon
10. Mi devos ... tiun leteron.  
A) elposti                      B) elpoŝtigi                      C) elpoŝtiĝi                      D) elpoŝti
11. Nun ni vojaĝu ...!  
A) en la montoj                      B) en la montojn                      C) al la montoj                      D) al la montojn
12. Fumanta cigaredo kuŝis en la ...  
A) cindrejo                      B) cindrujo                      C) cindringo                      D) cindrulo
13. En Hungario loĝas ...  
A) hungaraj                      B) hungaroj                      C) hungaranoj                      D) hungroj

14. Ni amikiĝis, kaj ni fartis bone ...  
 A) tutnokte                      B) la nokte                      C) nokta                      D) tutnokta
15. Hieraŭ tiu marmelado kostis nur 400 forintojn, nun ĝi kostas 600 forintojn. Okazis ...  
 A) prezentado                      B) prezaltigo                      C) prezmaniero                      D) prezo
16. La numero de mia ... estas 345.  
 A) postfako                      B) postaĵo                      C) poŝtfako                      D) posto
17. Mi tagmanĝis. Mi estas sata. Mi estas ...  
 A) senapetita                      B) priapetita                      C) apetita                      D) apetito
18. Li havis ... harojn.  
 A) aŭtunajn                      B) seriozajn                      C) arbajn                      D) grizajn
19. Ĉu vi havas ...? Vi devos stampi tiun kontrakton!  
 A) stampon                      B) stampedlon                      C) stampilon                      D) lakton
20. Mi timas ...  
 A) musoj                      B) muŝoj                      C) hundojn                      D) al vi
21. Kiu estas ..., tiu ne plaĉas al mi.  
 A) aĉa                      B) aĉista                      C) ĉasa                      D) aĉe
22. Atendeblas ...  
 A) malvarmon                      B) malvarmilo                      C) varma vetero                      D) emo
23. Ĉu mi povus kalkuli ... via helpo?  
 A) al                      B) ol                      C) en                      D) je
24. Hodiaŭ estos tre ...  
 A) malvarma                      B) varma                      C) malvarme                      D) bona
25. Kiam oni diras „mi prezentas min” – tio estas ... tempo.  
 A) estonta                      B) estanta                      C) estinta                      D) estita
26. Kiam oni diras „morgaŭ mi aĉetos florojn” – tio estas ... tempo.  
 A) esta                      B) estanta                      C) estonta                      D) liberan
27. Li envagoniĝis ...  
 A) per                      B) kun                      C) –                      D) pro
28. Tiu valizo estas dek ... peza.  
 A) kiloj                      B) kilogramoj                      C) kilogramojn                      D) centimetrojn
29. Mia brakhorloĝo ...  
 A) estas malbona                      B) malbonigis                      C) difektiĝis                      D) iĝis
30. Tra la fenestroj de la vagono videblas ...  
 A) kampojn                      B) bovaron                      C) dion                      D) arbaroj

31. La turistoj ... en la lago.  
 A) banas sin                      B) baniĝigi                      C) baniĝonas                      D) baniĝas sin
32. La boato ... sur la ondanta maro.  
 A) balanciĝis                      B) elbalanciĝis                      C) balanca                      D) balis
33. Apud la lito estas ...  
 A) hejtumo                      B) hejtado                      C) hejti                      D) hejtilo
34. Mi pagos per ... mono.  
 A) kontanta                      B) kontita                      C) konsta                      D) konta
35. Kiam naĝantoj atendas la finalon, ili trinkas refreŝigaĵojn, manĝas ĉokoladon, ... ili havu energion.  
 A) per ke                      B) pro ke                      C) por ke                      D) pri ke
36. Sur la fotoĵo mi vidas...  
 A) sporthalon                      B) sportbuŝon                      C) sporthapon                      D) sportan
37. Ofte mi uzas mian ...  
 A) mobiltelefonon                      B) postetelefonon                      C) poŝtelefonon                      D) mobilon
38. Ŝoforoj devas stiri kun granda ...  
 A) atentemo                      B) atemo                      C) temo                      D) teamo
39. Vi devas subskribi tiun kontrakton ...  
 A) propramana                      B) propramane                      C) propravarme                      D) pere
40. Kiam vi uzas vian bankkarton, vi devas uzi vian Personan ... Numeron (PIN-kód).  
 A) Identifikan                      B) Identigan                      C) Identigigan                      D) Identan
41. Antaŭ la urba galerio troviĝas la monumento ... reĝo Matiaso.  
 A) ol                      B) por                      C) de                      D) al
42. Tiu letero estas tuj respond...  
 A) enda                      B) anta                      C) inta                      D) onta
43. En tiu urbo estas la ... fortikaĵo de la Romianoj.  
 A) ie                      B) eksa                      C) ies                      D) ekstra
44. Tio estas tro bela .. esti vera.  
 A) por                      B) pro                      C) ke                      D) pri
45. Tiu parol... estas maldeca.  
 A) enda                      B) aĉo                      C) ato                      D) inda
46. Tiu vojeto kondukas ... la parko.  
 A) por                      B) al                      C) super                      D) per
47. Tondro memorigas la kredanton ... Dio.  
 A) pro                      B) per                      C) pri                      D) por



támogatnak futballcsapatokat és nem adnak interjúkat. A nyilvánosság előtt 1994-ben tűntek fel először egy nagy árvíz után Albában, amikor története során első ízben átmenetileg be kellett zárni az ottani üzemet. Aztán újra elrejtőztek, állítólag Belgiumban élnek.

---

Tömörítse a szöveget eszperantóul kb. fele terjedelemben, az alábbi szempontok felhasználásával!

1. Mikor, hol, miért keletkezett a mogyorókrém?
  2. Miből készült eredetileg, hogyan fejlesztették tovább?
  3. Hogyan magyarázza Ferrero a krém keletkezését, milyen szolgáltatás "igazolja" ezt az indítékot?
  4. A vállalkozás jellemzői számokban.
  5. A tulajdonosok jellemzése.
- 

## Megoldás

### Dolça vivo

En 1946 en iu malgranda itala urbo, Alba, la loka sukeraĵisto nomata Pietro Ferrero, suferis pro la manko de ĉokolada krudmaterialo. Alia problemoj estis, ke liaj klientoj eĉ ne estus povintaj aĉeti multekostajn ĉokoladajn dolĉaĵojn. Tial li decidis anstataŭe utiligi rostitan avelon, famaĵon de la ĉirkaŭaĵo. Li miksis la muelitan avelon kun kakaopulvoro, kakaobutero, vegetaĵa oleo, laktopulvoro, vanilo kaj sojolecitino. En la sekva periodo oni igis la kremon pli ŝmirebla kaj gusto-riĉa. Pietro mem poste emis deklaron, ke la vera kaŭzo de la estigo de tiu mola kaj bongusta kremo estis malebligi al la severaj patrinoj senigi siajn infanojn je dolĉaĵoj. Por altiri infanan klientaron, en nutraĵvendejoj oni proponis ŝmiri per avelokremo la kunportitajn pantranaĵojn. La fondinto mortis en la 50aj jaroj. Nun estras la entreprenon lia 77 jara filo. En la uzinoj estas dungataj 13 mil homoj, kaj la enspezoj atingas 1,7 miliardojn da eŭroj. La nuna familio troviĝas en la 128a loko en la ekonomia mondlisto de la magazino Forbes. La anoj de la familio evitas publikajn aperojn, ili vivas verŝajne en Belgio.

---

## III. Fordítás eszperantóról magyarra

**Elérhető pontszám: 20**

### Adriatika marbordo

Albana Riviero estas konsiderata kiel la lasta ekologie pura marbordo de la Adriatika Maro. Ĝia unua vidindaĵo estas Llogara, kiu estas parto de nacia parko, posedanta riĉan pinarbaron. Ene de ĝi estas pluraj vilaoj, kaj ankaŭ restoracioj, en kiuj oni ofertas freŝkuiritajn ŝafidaĵojn kaj kapridaĵojn. Vilaĝo Dhermi estas unu el la unue ekestintaj loĝlokoj ĉe la marbordo. Sude de ĝi videblas kasteleto, troviĝanta sur duoninsulo ĉe la golfo. Ĝi iam apartenis al Ali Paŝa, kiu estis unu el la lokaj regantoj dum la otomana periodo. Kiam Ali Paŝa kunigis siajn militfortojn kun kristanaj grekaj ribeluloj, la turka sultano sieĝis la kastelon, kaj li senkapigis la paŝaon.

Vojaĝante suden oni trapasas ankaŭ aliajn belajn vilaĝojn kaj fine atingas urbon Saranda. La

ripozejo estas famekonata pro sia varma mediteranea klimato, kiu ebligas naĝi ankaŭ meze de oktobro en la Adriatika Maro. La urbon indas rigardi pro sia belega promenejo laŭlonge de la marbordo same, kiel domoj en paralelaj stratoj unu super la alia sur monteto.

Vizitindas ankaŭ antikva urbo Bultrint, situanta malpli ol 20 km-ojn sude. Ĝi estas protektata de Unesko-fondaĵo. La amfiteatro de Aesculapius, baptistejo kaj la antikvaj muregoj estas inter la plej gravaj arkeologiaj vidindaĵoj de Butrint.

Norde de Saranda estas majesta akvofontego nomata "Blua okulo". Estante sub la ombro de tre maljunaj kverkoj, al tiu loko estas intime ligita la legendo pri dekdukapa drako. Oni rakontas, ke la drako kaptis la junedzinojn kaj ne permesis al la vilaĝanoj ĉerpi akvon el la fonto. Post la mortigo de la drako fare de la vilaĝanoj, ekfluis klara akvo el ĝia okulo, kaj tio estigis la riveron Bistrica.

---

## Megoldás

### Adriai tengerpart

Az Albán Riviérát tartják az Adriai-tenger utolsóként megmaradt tiszta környezetű (ökológiailag tiszta) tengerpartjának. A legelső látnivalója Llogara, amely egy nemzeti park része, és fenyőerdőben gazdag terület. Számos villa van benne, és éttermek is, amelyekben bárányból és kecskéből készült friss ételeket kínálnak. A Dhermi nevezetű falu a tengerpart egyik elsőként létesült települése. Tőle délre egy kastély látható, az öbölnél lévő félszigeten. Valamikor Ali Pasának, a török uralom egyik helyi képviselőjének a birtoka volt. Amikor Ali Pasa haderejét egyesítette a keresztény görög lázadókéval, a török szultán megostromolta a várat, és lefejeztette a pasát.

Dél felé utazván további szép falvakon haladunk át, és végül elérjük Saranda városát. Az üdülőhely igen híres, meleg mediterrán klímája miatt, amely lehetővé teszi, hogy október közepén is ússzunk a tengerben. A várost érdemes megnézni a tengerparton húzódó hosszú és gyönyörű sétánya miatt, és a dombon egymással párhuzamosan futó utcák házai miatt is.

Szintén érdemes meglátogatni az alig 20 km-re délre fekvő ókori Bultrint városát. Egy Unesco-alapítvány védelmében áll. Aesculapius amfiteátruma, egy keresztelőkápolna és az ókori falak Butrint legfontosabb régészeti látnivalói.

Sarandától északra van egy hatalmas vízforrás, melyet „Kék szem”-nek neveznek. Az öreg tölgyek árnyékában meghúzódó helyhez szorosan kötődik a tizenkétfejű sárkány legendája. Azt mesélik, hogy a sárkány elkapta a menyecskéket, és nem engedte meg a falu lakóinak, hogy a forrásból vizet merítsenek. Miután a falubeliek megölték a sárkányt, a szeméből tiszta víz eredt, és ebből keletkezett a Bistrica folyó.

\*\*\*\*\*

## IV. Irányított fogalmazás (levélírás)

### Elérhető pontszám: 20

#### I.

Egy levelezőtársa látott egy statisztikát, amely szerint Magyarország élenjár az alkoholfogyasztásban. Azt kéri öntől, hogy írjon erről a témáról. Válaszában térjen ki az alábbi szempontokra:

- Az ön személyes tapasztalata szerint mennyire súlyos probléma az alkoholizmus Magyarországon?

- Mi vezethet alkoholizmushoz? Milyen szerepük lehet a társas kapcsolatoknak?
- Milyen károkat okoz ön szerint a túlzott alkoholfogyasztás?
- Az ön egyik ismerőse soha nem iszik alkoholt. Mi erről a véleménye?
- Mesélje el, ön hogy találkozott először szeszes itallal, s az ön életében milyen szerepe van az alkoholnak?

Vagy:

## II.

Számoljon be külföldi ismerősének arról, hogy autót vásárolt!

- Miért vett autót, milyen változást hozott ez az életében?
- Hogyan választotta ki autóját?
- Mi tette lehetővé, hogy megvegye?
- Milyen anyagi terhet jelent ma Magyarországon az autó fenntartása?
- Mi a véleménye a hazai közlekedési morálról?

## Megoldás

### I.

Budapeŝto, la 27-an de novembro 2014

Kara Juan!

Estis tre interesa, kion vi skribis pri la indianaj kutimoj. Mi esperas, ke iam mi povos partopreni iun feston en Argentino.

Koncerne vian demandon pri alkoholismo en Hungario mi ne havas precizajn sociologiajn indikojn. Persone mi spertas, ke gejunuloj drinkas multe, mezaĝuloj same. Laŭ mia opinio, se somere tuttage oni trinkas du botelojn da biero, tio ne signifas, ke oni estas alkoholistoj.

Irante al la universitato mi pasas preter drinkejo, kie ekde frumateno ĉiam staradas grupeto da homoj en la korto, kiuj komencas ĉiun tagon tie (aŭ eble eĉ pasigas la tutan tagon) per trinkado de brando. Laŭ mi tiuj homoj – plejparte viroj – estas alkoholistoj, ja trinki grandan kvanton da alkoholo, kaj tio iĝis por ili ĉiutaga vivbezono. Ĝenerale ili havas kontakton nur kun samsortuloj; alkoholismo kaj agresemo kunligiĝas, pro tio oni preferas malhavi ajnan rilaton kun tiaj personoj.

La sekvoj de alkoholismo estas do parte sociaj: ŝanĝiĝas la laborkapablo, kiu iom post iom povas finiĝi per senlaboriĝo; en la familia vivo la malekvilibriĝo de la buĝeto (alkoholaĵoj estas multekostaj) kaj la jam menciita agresemo rapide forigas toleremon kaj amon. Alkoholulo povas trovi sin surstrate sen hejmo kaj laboro. Pro la malfortiĝo de la korpo ankaŭ psikaj kaj aliaj sanproblemoj povas aperi. Estas ofte ne facile distingi sekvon

kaj kaŭzon: la supraj problemoj povas ekesti sen la influo de alkoholo kaj povas rezulti alkoholismon.

Mi konas iun, kiu estas tute abstina. Eĉ dum festoj ŝi ne partoprenas tostadon. Mi pensas, ke al la eŭropa kulturo apartenas modera konsumado de alkoholaĵoj.

En mia familio miaj gepatroj dum festaj tagmanĝoj ĉiam trinketas vinon, okaze de naskiĝtagoj ni tintas per ĉampano, kaj mi ne memoras ekde kiu aĝo ankaŭ ni, infanoj rajtis gustumi tiujn trinkaĵojn. Unue la bieron mi trovis ege malbongusta! Nun mi trinkas ankaŭ tion por akompani manĝaĵon aŭ por malstreĉiĝi. Mi sufiĉe bone toleras la alkoholon, ĝis nun mi iĝis nur ebrieta kelkfoje.

Mi aŭdis, ke indianoj tre facile perdas eĉ konsciencon pro alkoholo. Ĉu tio veras? Vi nenion skribis pri via nova laboro. Ĉu vi jam ekŝatis ĝin?

Tutkore mi salutas vin:

Kinga

---

## II.

Bicske, la 17-an de novembro 2014

Kara Julia!

Pardonu, ke en la lastaj monatoj mi silentis. Mi sukcesis diligente labori pri mia disertajo kaj hieraŭ mi finis ĝin.

Eble vi memoras, ke mi plendis multe pri tio, ke ĉiutage mi veturas tri horojn inter mia laborejo kaj hejmo. Mi estis lacega, mi tute ne povis koncentriĝi pri la studaĵo. Sed okazis granda ŝanĝo antaŭ tri monatoj. Mi decidis aĉeti aŭtomobilon.

Ĉio komenciĝis per tio, ke ni sukcesis vendi la domon hereditan de mia onklino. Tiel mi akiris sumeton kaj esperis realigi mian revon. Jam kiel gimnaziano mi lernis stiradon, kaj je la unua provo mi trapasis ekzamenon. Kelkfoje mi rajtis ŝofori la familian aŭtomobilon, laŭvice kun aliaj kvar personoj. Intertempe miaj du fratoj aĉetis al si uzitajn aŭtomobilojn. Mi ne kuraĝis, ĉar mi tute ne kompetentas pri teknikaĵoj. Tiel mi devis atendi ĝis mi povis aĉeti novan.

Jen, mi sukcesis! Mi petis unu el miaj amikoj veni kun mi en la aŭtovendejojn. Unue ni informiĝis pri la tipoj, konsumado kaj rabatoj. Post du semajnoj mi decidis aĉeti helverdan aŭtomobilon. Estis grave, ke ĝi havu kvin pordojn kaj ne konsumu multe. Mi aĉetis ĝin kredite, proksimume kvaronon de mia salajro nun mi elspezas por la aŭtomobilo (banka repago, asekuro kaj benzino).

Mi estas tre feliĉa, ĉar mi ŝategas ŝofori, mi ŝparas multe da tempo kaj multe malpli mi laciĝas. Ĝenerale mi ne rimarkas agresemon aŭ malĝentilecon parte de aliaj ŝoforoj. De tempo al tempo mi vidas kelkajn, kiuj ne respektas la trafiklumojn, do mi estas prudenta ĉe la vojkruciĝoj. Cetere mi aŭskultas miajn ŝatatajn diskojn dumvoje kaj dank'al mia bonhumoro mi kapablas labori eĉ vespere.

Dum la someraj ferioj mi volonte vizitus vin. Se ni iros kvarope, aŭtomobilo estos la plej malmultekosta trafikilo. Bonvolu skribi, kiu periodo estus taŭga por vi. Mi tre atendas nian novan renkontiĝon!

Mi deziras al vi ĉion bonan. Transdonu miajn afablajn salutojn al viaj familianoj!

Estu sana kaj feliĉa!

Kun koraj salutoj

Brigi

---

## V. Szövegértést ellenőrző feladat

### Elérhető pontszám: 25

#### La muziko, kiu konkeris la mondon

Ĵazo estas muzikstilo nun internacie konata kaj alte taksata kiel serioza, respektinda arto. Sed ne ĉiam estis tiel. Antaŭ cent jaroj la ĝermoj de ĵazo estis malestimataj kiel senkultura kaj eĉ maldeca muziko. Do kiel tia "muzikaĉo" (laŭ la kontraŭuloj) fariĝis la plej populara muziko en Usono (dum kelka tempo) kaj finfine fariĝis eĉ arta muziko? Por ekscii tion ni devas unue reiri al la sklaveca epoko de la usona sudoriento – la tempo, en kiu aperis la antaŭaĵoj de ĵazo.

Malgraŭ la klopodoj de la blankulaj sklavkomercistoj kaj sklavposedantoj forpreni la kulturon, lingvon, religion kaj identecon de sklavigitaj afrikanoj, multaj elementoj de afrika kulturo travivis. Unu el la plej persistaj postrestaĵoj de afrika kulturo estis muziko. La ritmoj kaj kantmanieroj de Afriko miksiĝis kun eŭropaj muzikiloj kaj muzikformoj kaj la angla lingvo. Ĉi tiu kunfandiĝo naskis novajn freŝajn sonojn, ĝis tiam konataj nek en Eŭropo nek en Afriko.

Verŝajne la plej grava muzikformo naskiĝinta senpere el la sklava kulturo estas bluso (de la angla blues [bluz] mallongigo de "blue devils" – melankolio, malbonhumoro.) Bluso estas tre simpla kompare al ĵazo. Ĝi estas precipe kantata, ĉu kun muzika akompano aŭ ne. Bluskantoj sekvas sufiĉe striktan poezian formulon, kaj la muziko kutime enhavas bemoligitajn notojn (kutime la tria kaj la sepa notoj de la gamo). La temoj de la kantotekstoj kaj la tono de la muziko estas malgajaj kaj melankoliaj, pro tio ke la muziko esprimas la suferojn de sklaveco kaj (post la abolo de sklaveco) malriĉeco, senlaboreco, amproblemoj k. s. Bluso dum multaj jaroj restis simpla muziko de malriĉaj kamparaj nigruloj en la sudoriento, sed pro la iom-postioma translokiĝo de nigruloj al urboj (serĉante laboron), bluso pli rafiniĝis kaj profesiiĝis.

Alia ege grava elemento de ĵazo estis ragtimo. La nova PIV difinas ragtimon kiel „Speco de muziko skribita, precipe por piano, naskiĝinta en la kleraj nigraj komunumoj de S(uda) Usono, karakterizita de sinkopa traktado de eŭropdevena muziko, kaj iĝinta unu el la ĉefaj fontoj de ĵazo”. Aldone, la etimologio de la vorto „ragtimo” – angle ragtime [ragtajm] – estas

rag (ĉifono) plus time (tempo) – aludo al la sinkopo (mislokigo de la regula akcento) de la muziko. Sed kvankam ragtimo, kiel bluso, estis produkto de la ĝenerala suda nigrula kulturo, ĝi ja esprimas tute alian parton de tiu kulturo. Kleraj urbaj nigrulaj muzikistoj, kiel la fama kaj popularega ragtimmuzikisto Scott Joplin [skot ĝoplen], studis eŭropajn muzikstilon kaj teorion, sed aldonis al tiu bazo fortan spicaĵon de la afrikdevena kulturo – precipe la ritmo. Ĉi tiu kombinaĵo estis sukcesega. Inter 1890 kaj 1915 (proksimume) ragtimo furoris – eĉ inter blankuloj. Unuafoje en la usona historio produkto de nigrula kulturo gajnis vastan akcepton inter blankuloj. Ankoraŭ plia, malpli konata fonto de ĵazo estis la latuninstrumentaj bandoj de la urbo Nov-Orleano. (Nov-Orleano, krome, estas konata kiel kunfandejo de la kulturoj de tri kontinentoj: Ameriko, Eŭropo kaj Afriko. La influo de tiuj tri kontinentoj montriĝas en la manĝaĵoj, arkitekturo, lingvaĵo, muziko kaj religio de la urbo.) Ĉi tiuj bandoj fontis el la kultura riĉeco de la Nov-Orleanaj nigrulaj komunumoj de la post-sklaveca epoko. La muziko de ĉi tiuj bandoj, simile al ragtimo, estis kombinaĵo de eŭropaj muzikiloj kaj melodioj kun afrikaj ritmoj. Ĉi tiu pra-ĵazo rolis ĉefe kiel danca kaj marŝa muziko por festoj, funebraj procesioj kaj paradoj - kaj speciale por la plej granda, plej fama stratfesto – Nov-Orleana karnavalo, - kiu finiĝas je la famega tago Mardi Gras („Grasa Mardo” estas la tago antaŭ Cindromerkredo kaj la lasta tago de karnavalo en Nov-Orleano.) Sed la plejmulto da tiuj muzikistoj ne estis profesie trejnitaj kaj ne povis legi muziknotojn. Pro tio oni kutime ludis muzikaĵojn parkere kaj ofte iom malstrikte – eĉ foje kun originalaj spontaneaj aldonadoj. Ĉi tia libera sinteno al la muziko naskis intencan improvizacion – eble la plej unika en la ĵazo. Kvankam ne ekzistas unusola difinita naskiĝloko de ĵazo, la urbo Nov-Orleano estas ofte nomata la „lulilo de ĵazo”, ĉar la diversaj elementoj de frua ĵazo facile kaj harmonie kuniĝis en la diverskultura, muzikema medio de tiu urbo. Kaj ankoraŭ Nov-Orleano estas mekko por amantoj de tradicia ĵazo. En la frua parto de la dudeka jarcento (ĉirkaŭ la tempo de la Unua Mondmilito) multaj nigrulaj kaj blankulaj muzikistoj migris de Nov-Orleano al Ĉikago. De Ĉikago ĵazo povis disvastiĝi pli rapide kaj atingi pli grandan aŭskultantaron ol de Nov-Orleano, kaj baldaŭ ĵazo populariĝis tra la tuta Usono. Ĵazo tiel furore populariĝis kaj tiel difinis la tiutempan popularan kulturon, ke la 1920aj jaroj ricevis la kromnomon „Ĵazepoko”.

\*\*\*\*\*

1. Milyen kulturális elemekből jött létre a jazz? (3 pont)
  2. Melyek a jazz zenei forrásai, miben különböznek egymástól? Töltse ki a táblázatot! (17 pont)
- | zenei forrás | Előadók | hangszer | egyéb jellegzetessége(i) |
|--------------|---------|----------|--------------------------|
|              |         |          |                          |
3. Melyik várost nevezik a jazz bölcsőjének, miért? (2 pont)
  4. Mi segítette elő a jazz elterjedését, s mikorra tehető a jazz fénykora? (3 pont)



9. Ili venis ... la oceano.  
 A) trans B) el trans C) tra D) el
10. ... la morto de mia avo mi estas tre malĝoja.  
 A) ek B) de post C) por D) pri
11. La ebrulo falis ... la seĝo.  
 A) de sur B) el C) sur de D) pri
12. Iru for ... mi!  
 A) antaŭ B) antaŭe C) antaŭen D) de antaŭ
13. Oni sonoras ... sonorilo.  
 A) kun B) per C) pri D) al
14. La parto de la homa korpo estas ...  
 A) hakilo B) makzelo C) amo D) homo
15. Plej larĝa estas ...  
 A) rivereto B) rivero C) riverego D) rivo
16. Kiam mi malsatiĝas, mi manĝas...  
 A) mantelon B) sangon C) kolbason D) vin
17. Mi ne ... fari mian hejman taskon, ĉar mi ne havis tempon.  
 A) rajdis B) povis C) plaĉis D) postis
18. Francisko edzinigis ... Elizabetan.  
 A) al si B) por si C) per si D) kun si
19. En Afriko multaj infanoj mortas ... malsato.  
 A) pri B) kun C) pro D) dum
20. Tiu domo apartenis ... mia praavo.  
 A) pri B) pro C) por D) al
21. Juvelaĵo estas ...  
 A) kolĉeneto B) ŝtoneto C) ventreto D) talieto
22. ... estas parto de la homa korpo.  
 A) buŝo B) breto C) posteno D) frago
23. Fratino de mia edzo estas mia ... fratino.  
 A) eks B) bo C) ge D) kun
24. Ili loĝas tie ... kelkaj jaroj.  
 A) ek B) ekde C) trans D) tra
25. La elirejo troviĝas ... tiu loko.  
 A) krom B) en C) preter D) pri

26. Fiŝhok...o estas agrabla hobia.  
 A) il B) ad C) at D) ig
27. Oni ... Petro.  
Nia najbarino estas profesia kuiristino, kaj ŝi laboris multe en nia kuirejo kun mia patrino. La gastoj povis elekti viandsupon (buljonon, fruktosupon kun dolĉa acida laktokremo), frititajn, gratenitajn fungojn, kokinbrustojn kun frititaj terpomspecoj, francan salaton, fiŝsupon. Fine ni surtabligis kazeitajn vualkukojn, fruktan torton kaj aliajn bakaĵojn.

La plej grandan sukceson havis la kvaretaĝa naskiĝtag-torto el persikoj. Sur ĝi staris kaj brulis 20 kandletoj. Dume kaj poste ni kantis, ridis, interparoladis tre multe. Ni aŭskultis dancmuzikon kaj dancis. Pri kio ni babildis? Pri fraŭlinoj, fraŭloj, filmoj, vojaĝoj, prezentaĵoj, muziko, somero.

La 21-an de aŭgusto estos mia naskiĝtago. Mi invitas vin.

Ĝis tiam mi deziras al vi fortan sanon, multe da ĝojo.

Debrecen, la 20-an de julio 2014

Kisetas vin

via amikino  
Beatrix

\*\*\*\*\*

## Levél (6.)

**Egy munkanap délelőtt váratlanul szabadidőhöz jut.**

- **Sétálni indul a belvárosba.**
- **Meglepődve tapasztalja, hogy árleszállítás van.**
- **Nagyon megtetszik önnek egy kosztüm (öltöny). Bemegy az üzletbe, és felpróbálja.**
- **A választásban az eladó is segíti.**
- **Örül döntésének, mert a ruha jól áll önnek, és nem került sokba.**
- **Írja meg ezt édesanyjának!**

-----  
Kara mia Panjo!

Imagu, kio okazis al mi hieraŭ antaŭtagmeze! Mi ricevis du liberajn horojn de mia ĉefo, ĉar mi havis jam multe da kromhoroj. Mi havas bonan ĉefon, ĉu ne?

Mi enbusiĝis, kaj mi ekveturis al la urbocentro. Je mia granda surprizo, promenante mi povis rigardi riĉan asortimenton de varoj en la montrofenestroj. Vi scias, ke mi havas malaltan salajron, sed mi ekvidis varojn kun rabatoj. Tre ekplaĉis al mi bela, bruna, eleganta kompleto. Ĝi kostis nur 12.800 forintojn. Mi eniris la butikon, kaj mi petis tiun tajlorkostumon. Mi mezuris ĝin. La vendistino diris, ke tiu kostumo bone sidas al mi. (Ŝia nomo estas Andrea. Evidentiĝis, ke ni estis samklasanoj!) Dank' al Dio laŭ mia vidpunkto ĝia mezuro taŭgis al mi, tial mi aĉetis ĝin.

Mi opinias, ke mi povos porti ĝin vintre, ĉar ĝi estas farita el varma materialo. Ĉu laŭ via opinio ĝi valoras sian prezon? Mi esperas, ke via respondo estos „jes”.

Dimanĉe, kiam ni renkontiĝos, mi transdonos al mi mian surprizon, kiun mi aĉetis al vi okaze de via naskiĝtago.

Ĝis tiam mi deziras al vi ĉion bonan!

Debrecen, la 22-an de julio 2014

Kisetas vin

via filino  
Bea

\*\*\*\*\*

## Levél (7.)

1. Hétvégére kirándulást terveztek barátaival a hegyekbe. (Hogyan képzelte el a napot?)
2. Szombaton elromlott az idő.
3. Vasárnap délelőtt írt egy levelet ismerősének, aki nem akart önökkel kirándulni. Írja le a részleteket.
4. Változott a program. Színházba mentek. Ön vette meg a jegyeket.
5. Hogyan sikerült a nap?

-----  
Kara Helena!

En via lasta letero vi demandis, kiel mi pasigis mian liberan tempon semajnfine. Tiu demando estas aktuala ankaŭ nuntempe. Mi sidas en mia ĉambro. Estas la 11-a horo antaŭtagmeze.

Sabate kaj dimanĉe mi volis ekskursi kun miaj geamikoj. Vi scias, ke la realiĝo de tiu programo dependas de la vetero. Ekpluvis kaj ni ne povis efektiviĝi nian planon. Ni estus dezirintaj veturi al la montaro Bükk. Ni estus grimptaj montpintojn, manĝintaj en restoracio, apud kiu troviĝas fiŝlageto. Miaj geamikoj ŝatas fiŝhoki, promenadi, ĝui la naturon. Endre kutimas fiŝhoki grandajn silurojn kaj ezokojn.

Rigardante tra la fenestro mi vidas, ke la ĉielo estas griza kaj pluvas senĉese. Pasintsemajne ni prokrastis tiun ekskurson, kaj ni volus efektiviĝi ĝin sekvontsemajn-fine. Sabate matene mi interparolis kun miaj geamikoj per telefono, kaj ni konstatis kun malĝojo, ke ni devos ŝanĝi nian programon.

Ni decidis rigardi teatraĵon en la Teatro Pesti. Mi mendis ok biletojn por la 19-a horo. Tiam komenciĝis la dramo „Hamlet” de Shakespeare. Ni renkontiĝis je la sesa kaj duono en la teatro. Poste ni vespermanĝis en la restoracio „Pallas”. Tie oni kuiras kaj fritas bone. (Mi konas persone la ĉefkuiriston de la restoracio. Iam li estis la plej bona amiko de mia patro.)

Ni pasigis neforgeseblajn horojn kune – sen ekskurso.

Mi deziras al vi bonan veteron, por ke vi povu pasigi vian liberan tempon sub la ĉielo.

Debrecen, la 23-an de junio 2014

Ĉion bonan deziras al vi

via amikino  
Annamária

\*\*\*\*\*

## Levélírási témák

1. Német barátja december első két hetét önkönnél tölti. Levélben kérje meg, hogy játssza el a Mikulás szerepét a gyermekei számára. (Mindkét fia jól beszél németül, mert felesége svájci, születésüktől kezdve németül és magyarul társalognak.)

- Az egész mindössze néhány percig tart majd.
- Gyermekei nem ismerik fel.
- Csak az ajándékokat kell átadni néhány rövid mondat kíséretében.
- A helyszínen mindenről gondoskodik (fehér szakáll és piros köpeny, ajándékok stb.).
- Köszönje meg a segítséget.

2. Házuk lakói nevében írjon egy panaszos levelet a polgármesteri hivatal szabálysértési osztályának.

- Az önök melletti épületet több hónapja renoválják.
- Szóban és írásban többször kérte az építésvezetőt, hogy a járdán lévő építőanyagot (deszkákat, köveket, sódert) távolítsák el.
- Mivel a járdából legalább 80 métert lezártak, ezen kívül 20 méter hosszan építőanyagot tárolnak, nem lehet ott közlekedni.
- Az ott lakók – elsősorban idős emberek – arra kényszerülnek, hogy az úttesten menjenek a buszmegállóig. Ez pedig veszélyes, mert nagy a forgalom.
- Kérjen helyszíni szemlét és azonnali intézkedést.

3. Ön külföldi és Magyarországon autót szeretne bérelni. Barátjától levélben érdeklődjön.

- Milyen típusú kocsit érdemes bérelni és miért?
- Mennyi a napi bérleti díj, kilométerpénz, biztosítás?
- Mennyibe kerül az üzemanyag?
- Kinek kell javíttatnia a kocsit, ha meghibásodik?
- Kérdezze meg, jár-e kedvezmény, ha hosszabb időre bérlő az autót.

4. Írja meg panaszát egy külföldi utazási irodának.

- Az idegenvezető programváltozást jelentett be.
- Kifogásolja, hogy önt nem érdeklő a városi múzeum, hajókirándulásról volt szó.
- Arra fizetett be.
- Ne elégedjen meg azzal, hogy az utazási iroda visszatéríti a kirándulás árát.
- Kérjen kártérítést, vagy egy újabb lehetőséget a hajókirándulásra.
- A múzeumi belépő és a hajókirándulás költsége, élménye között óriási eltérés van.

5. Külföldi ismerőse megírta önnek, hogy kislánya elvesztette az aranygyűrűjét, amit születésnapjára kapott.

- Azzal bünteti a gyereket, hogy nem engedi el az osztálykirándulásra.
- Megfenyegette, hogy soha többet nem vesz neki ajándékot.
- Önt mindez felháborítja. Vegye védelmébe a gyermeket.
- Érveljen a helyes nevelés mellett.

6. Német barátjának a fiát, Gustavot jól ismeri.

- Javasolja neki, hogy érettségi után jelentkezzen az orvosi egyetemre, mert ön szerint kiváló orvos lehetne.
- Érvei között szerepeljen az, hogy jól tudja a biológiát és a fizikát.
- Szeret gondoskodni a gyengébbekről, a betegekről.
- Gyermekkor óta mindenkin segített, aki erre rászorult, sőt egy természetgyógyász tanfolyamot is elvégzett.

7. A londoni repülőtéren elveszett a csomagja.

- Miután a talált tárgyak ügyintézőjéhez fordult, és elmesélte az esetet, ő megkérte írjon le mindent.
- Írja meg személyi adatait!
- Honnan és hová utazott (a légitársaság neve, járatszám, érkezés ideje stb.)?
- Milyenek volt a csomagja (színe, tartalma, értéke)?
- Mikor vette észre, hogy a bőröndje eltűnt?

- Kivel közölte már a fenti információkat szóban?
- Írja meg a címét, szállodájának nevét és telefonszámát!
- Meddig tartózkodik ott? Utána milyen címen és telefonon lesz elérhető?
- Kérdezze meg: ha nem lesz meg a csomagja, milyen kártérítésre tarthat igényt? Mikor kapja meg?

8. Egy hónappal ezelőtt jelentkezett egy bébiszittert kereső hirdetésre. Nem kapott választ.

- Röviden utaljon előző írásbeli jelentkezésére (írjon magáról adatokat).
- Udvariasan kérdezzen rá, miért nem kapott választ.
- Kérdezze meg, mi alapján döntöttek vagy döntének.
- Kérjen telefonon választ.

9. Egy híres angol szemorvosnak ír levelet.

- Az orvos különleges eljárását a napokban mutatták be a tévében.
- Rövidlátókat operál, akik a műtét után könnyen és gyorsan gyógyulnak meg.
- Az egyik családtagjának hasonló műtetre lenne szüksége. Kérdezze meg a feltételeket (ár, időtartam stb.).
- Milyen leleteket kell beszerezni előzetesen?

10. Angol barátnője esküvőjére készül, és az ön tanácsait kéri.

- Csipkés fehér ruhát szeretne kölcsönözni.
- Ön praktikus szempontból teljes mértékben ellenzi a kölcsönzést, különösen az ilyen típusú esküvői ruhát. Indokolja meg, miért.
- Írja meg, milyen más megoldási lehetőségek vannak (varratni lehet, készen venni, később is hordható, elegáns ruhát lehet kölcsön kérni stb.).

\*\*\*\*\*

## Fordítás eszperantóról magyarra

### Szöveg (1.)

#### Kiel rekrei la bildon pri Esperanto?

Kiam mi fariĝis esperantisto, mi estis junulo kun multe da amikoj kaj multe da bonaj rilatoj en mia familia, profesia kaj hobiaj rondoĵoj. La amikecoj estis supraĵaj, ĉar en la fundo de mia koro mi malkonsentis kun la plimulto de la homoj kun kiuj mi rilatis. En la Esperanto-klubo en Antverpeno mi trovis medion de maljunuloj (la meza aĝo estis 60-jara), sed ili lasis al mi la liberecon por kovri mian idealismon kaj tute laŭplaĉe provi ekpraktiki ĝin. Mi fondis junularan grupon, kies regulojn, mi mem difinis, kaj ekvidis kurson sen iu ajn kontrolo de pli sperta instruisto. Nur multajn jarojn poste mi konsciiĝis, kiom individualisma mi estis. Mi apenaŭ petis helpon aŭ konsilojn. Sed mi eĉ ne ricevis klarajn instrukciojn. La pli aĝaj membroj precipe kontentis, ke mi volis fari ion. Kiam nun mi rerigardas al tiu unua periodo, mi bedaŭras forte, ke en unu el la plej renomaj kluboj en Eŭropo okazis preskaŭ neniuj transdonoj de la tradicio. Mi elspezis preskaŭ mian tutan energion por ankoraŭfoje refari la samajn erarojn de multaj aliaj antaŭuloj.

Kvankam Esperanto estas komunikilo por eviti miskomprenojn kaj do devus konduki al pli da homa feliĉo, mi rimarkis, ke multaj aktivuloj – same kiel mi en la unuaj jaroj de miaj streboj por Esperanto – ekhavas ĉagrenon kaj spertas malfeliĉon ĝuste pro sia agado.

Mi interŝanĝis ideojn pri eblaj kialoj de seniluziiĝo kun multaj personoj. Iom post iom fariĝis klare por mi, ke la ĉefaj fontoj de ĉagreno estas la individualismemo, la nerealaj esperoj, kaj la neadaptiteco al la nuntempo. Malhelpi tion estas longdaŭra procezo. Necesas trarompi multjaran tradicion.

Eviti izolitajn agadojn iĝis mia konstanta zorgo. La aktivuloj devas al kutimiĝi al interkonsiliĝado por ĉiuj siaj iniciatoj, al interŝanĝo de bonaj kaj malbonaj spertoj, kaj al la akcepto de komune ellaboritaj reguloj.

---

## Megoldás

### Hogyan alakítsunk ki új képet az eszperantóról?

Fiatalemberként lettem eszperantista, sok barátom volt, sok jó családi, munkahelyi és hobbi-kapcsolatom. A barátságok felületesesek voltak, mert a szívem mélyén más véleményen voltam a velem kapcsolatban álló személyek többségével. Az antwerpeni eszperantó klubban öregek gyülekezetét találtam (az átlagéletkor hatvan év volt), de hagyták, hogy szabadon tárjam fel idealizmusomat, és rajtam állt, hogyan próbálom meg átültetni a gyakorlatba elképzeléseimet. Ifjúsági csoportot alakítottam, amelynek szabályait saját magam határoztam meg, és elkezdtem tanítani, gyakorlottabb tanár felügyelete nélkül. Csak jóval később tudatosult bennem, hogy mennyire önző voltam. Alig kértem segítséget vagy tanácsot. Nem kaptam egyértelmű utasításokat sem. Az idősebb tagok inkább örültek annak, hogy csinálni akarok valamit. Visszatekintve erre az első időszakra, nagyon sajnálom, hogy Európa egyik leghíresebb klubjában szinte semmilyen hagyomány-átörökítés nem létezett. Szinte minden energiám arra ment el, hogy megismételtem sok más elődöm hibáit.

Bár az eszperantó olyan kommunikációs eszköz, amely arra szolgál, hogy elkerüljük a félreértéseket, s ezáltal több emberi boldogsághoz jussunk, azt vettem észre, hogy sok aktivistát – akárcsak engem az eszperantóért történő ügyködésem első éveiben – éppen a tevékenysége folytán ér kudarc, és amiatt lesz bánatos.

Sokakkal folytattam eszmecserét az illúzióvesztés lehetséges okairól. Lassanként világossá vált számomra, hogy a bánat fő forrása az individualizmusra való hajlam, a valósághoz nem igazodó remények, és az, hogy nem alkalmazkodunk a jelen körülményeihez. Mindennek megelőzése hosszantartó folyamat. Sokéves hagyományt kell megtörni.

Allandó törekvésemmé vált, hogy elkerüljem az elszigetelt tevékenységet. Az aktivistáknak hozzá kell szokniuk, hogy minden kezdeményezésüket megbeszéljék egymással, kicseréljék jó és rossz tapasztalataikat, és hogy elfogadják a közösen kidolgozott szabályokat.

\*\*\*\*\*

## Szöveg (2.)

### Memoro pri io bela

Por esti komprenata la cirkoarto ne postulas de la publiko iun ajn lingvon - tial ĝi estas inter la plej internaciaj el ĉiuj artoj. En la pasinteco oni ofte konsideris la cirkoarton kiel ion nenaturan, kiel ion misteran, kaj apartaj cirkanoj aŭ eĉ tutaj trupoj estis persekutataj, pro tio, ke ili praktikis ion malklaran por la homoj. Nun la cirkoarto okupas gravan lokon en la kultura vivo de multaj popoloj. Preskaŭ ĉiu homo en sia infanaĝo revis estiĝi artisto en cirko, kvankam nur tiuj, kiuj kontaktas cirkanojn aŭ legas pri ili, ricevas impreson pri ties vivo.

En la naciaj literaturoj, same kiel en Esperanto, oni malofte havas okazon legi pri la cirkoarto; Sub cirkotendo estas eble la unua tiuspeca libro en la Esperanta literaturo. En ĝi la aŭtoro rakontas pri la vivo en iu ĉeĥa cirko antaŭ trideko da jaroj. La libro mem ne pretendas, ke ĝi prezentas la vivon en ĉiuj cirkoj kaj en ĉiuj tempoj - prave, ĉar la vivo en ĉiu cirko estas malsama kiel la homoj mem. Mi mem dum kelkaj jaroj laboris sub cirkotendo, kaj la libro memorigas min pri io bela, pri io mia.

Tamen Stan Bubeniĉ laŭ mi ne tute bone konas la vivon de la migrantaj artistoj. Nur kiam li ne plu povis praktiki sian laboron kiel juristo, li fariĝis cirka muzikisto, kaj kvankam en la cirko ĉiuj - la artistoj, muzikistoj, reĝisoroj - estas unu tuto, la aŭtoro faras ian diferencon inter la muzikistoj kaj la aliaj. Li fakte tute ne tuŝas la temon de la cirko kiel arto, kvazaŭ ĝi estus fremda al li, sed liaj herooj estas homoj el karno kaj sango, kaj iliaj travivaĵoj estas interesaj.

\*\*\*\*\*

## MEGOLDÁS

### Emlékezés valami szépre

Ahhoz, hogy a cirkuszművészetet megértse a közönség, semmiféle nyelv nem szükséges - ezért aztán a cirkusz a legnemzetközibb művészeti ágak közé tartozik. Régen gyakran tekintették a cirkuszt valami természetellenes, misztikus dolognak és egyes cirkuszosokat vagy éppen egész társulatokat üldöztek azért, mert az emberek számára nem világos dolgokkal foglalkoznak. Napjainkban sok nép kulturális életében tölt be fontos szerepet a cirkusz. Szinte mindenki álmodozott arról gyerekkorában, hogy cirkuszi artista legyen, jóllehet csak azok kapnak benyomást a cirkuszosok életéről, akik kapcsolatban állnak velük, vagy olvasnak róluk.

A nemzeti irodalmakban, csakúgy, mint eszperantóul, ritkán van alkalom rá, hogy a cirkuszról olvashassunk; a Cirkuszi sátorban című mű talán az első ilyenfajta könyv az eszperantó irodalomban. Szerzője egy harminc évvel ezelőtti cseh cirkusz életéről mesél benne. A könyv nem vállalkozik minden cirkusz mindenkori bemutatására - joggal, hiszen az élet minden cirkuszban más, akárcsak maguk az emberek. Magam is dolgoztam néhány évig cirkuszi sátorban, és a könyv valami szépre emlékeztet, valamire, ami a sajátom.

Pedig Stan Bubenic szerintem nem ismeri egészen jól a vándorartisták életét. Amikor nem végezhetett jogászi munkáját, csak akkor lett belőle cirkuszi zenész, és noha a cirkuszban mindenki - az artisták, zenészek, rendezők - együtt alkotnak egy egységes egészet, a szerző valamiféle különbséget tesz a zenészek és a többiek között. Valójában egyáltalán nem érinti a cirkusz művészetének témáját, mintha távol is állna tőle, de hősei hús-vér emberek, és élményeik érdekesek.

\*\*\*\*\*

## Szöveg (3.)

### Sur propra tereno estas propra preĝejo

La 42-jara litovo Pijus Stulginskis el la malgranda urbeto Vaiguva en la regiono de Kelme mirigis familianojn, najbarojn kaj ĉiujn loĝantojn, konstruante apud sia propra domo veran preĝejon. Malgraŭ tio ke li ne konsideras sian konstruaĵon preĝejo, sed nur kapelo, tamen ĝi aspektas kiel ververa preĝejo, tia, kian posedas preskaŭ ĉiu urbeto de Litovio.

La ideo de propra sanktejo naskiĝis antaŭ ses jaroj. Pijus rakontas, ke ekde sia infanaĝo li estas fervora kredanto. "Mi ĉiam admiris la belecon de kapeloj, kaj hazarde eĉ mem ekpensis konstrui unu apud mia domo".

Post unu jaro estis preta la kapelo. Pijus instaligis en ĝi malgrandan altaron kun statuo de Sankta Maria. Fojfoje venadis pastro, kunvenis najbaroj kaj ĉiuj preĝis. Dek personoj povis libere eniri la kapelon. Dum ĝia inaŭguro kunvenis eĉ cent interesitoj.

Kiam la ideo estis realigita, Pijus decidis, ke tio ne estas sufiĉa. Li detruis unu muron de la kapelo, kaj komencis renovigi ĝin. La nova konstruaĵo jam estis multe pli granda kaj impona. Laŭ ĝenerala aspekto ĝi similas preĝejon. Ĝia areo estas 100 kvadrataj metroj. Preskaŭ ĉiujn laborojn Pijus faras mem, kelkfoje helpas najbaroj. Dum preskaŭ tri jaroj li jam faris ĉiujn plej gravajn laborojn, restis nur plibeligaj kaj ornamaĵoj taskoj. Eksciinte pri la planoj de la viro el fora litova urbeto, pluraj personoj ekdeziris subteni la projekton: proponis senkoste konstrui pordegon, skulpti sonorilon, donacis monon.

Demandinte, kiel reagis la edzino kaj aliaj familianoj al tio, kio okazis apud dome, Pijus ne klare respondas: „Ili scias, ke mi estas mi”. En la urbeto la viro estis tuj titolita kiel strangulo. Neniu el la familianoj, nek la najbaroj laŭdis lin pro la ideo. Por ili ne estas kompreneble, kial viro ekkonstruis ne profitodonan restoracion aŭ diskotekon, sed preĝejon, kiu alportos neniun monon kaj eĉ elĉerpos la tutan familian buĝeton. Pijus konfesis, ke li eĉ timas kalkuli, kiom da mono li jam investis al la konstrulaboroj. Li ne volas tion scii por ne malfaciligi la vivon.

La strangulo el Litovio planas, ke lia preĝejo estos finkonstruita post ĉirkaŭ tri jaroj. Li ne planas, ke en la propra preĝejo estos ankaŭ propra pastro. „Eble ĉi tie povos okazi porokazaj mesoj aŭ religiaj festoj”, revas la viro. Li eĉ ne troe dramigus, se la registaro postulus malkonstrui la kontraŭleĝan kreaĵon. „Ankaŭ Kristo suferis. Suferi por mi signifus bonfarti antaŭ Dio. Kredo neniam estis sensufera. Kredantoj ĉiam suferadis de ĉiuj registaroj”, asertas la preĝejkonstruanto, ankoraŭ konfesinte, ke la konstruo de la preĝejo nun por li estas vera plezuro kaj vivsenco.

\*\*\*\*\*

## Szöveg (4.)

### Biografio de Zamenhof

Kara Sinjoro!

Vi petas, ke mi donu al vi detalojn pri mi kaj pri mia vivo. Tre volonte mi tion ĉi faros, kiom mi povos, sed bedaŭrinde mi povos fari ne tre multe. Jen estas miaj kaŭzoj: por la estontaj generacioj mia biografio eble estos ne seninteresa, ĉar efektive mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun, prezentas konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj.

A) Interne en mi konstante batalis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj, sed kiujn reciproke interkonsentigi estis treege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis.

B) Ekstere mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenadis al la idealoj en modo, kaj tial neniam mankis al mi mokantoj kaj atakantoj. Krom tio mi tre multe da jaroj havis grandajn kaj tre turmentajn klopodojn kun la akiro de mia pano, kaj tiu ĉi batalado pri la pano tre venenis mian vivon. En la lastaj jaroj mi fine atingis tion, ke pano jam al mi ne mankas: sed, ho ve, la longa batalado min tre lacigis, kaj nun, ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi jam sentas min kiel homo 60 jara.

Mi naskiĝis en urbo Bialystok, la 15-an de decembro 1859. Mia patro (marĝene: kiu ankoraŭ vivas) kaj avo estis instruistoj de lingvoj. La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukita, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (marĝene: en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn, kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion). Kun plezuro mi lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per miaj okuloj, sed ne per mia buŝo, tial mi flue parolis, legadis nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane); la lingvon francan mi legas facile, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio en diversaj tempoj mi lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.

En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimas, kaj premegeas miajn fratojn, mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke malamas kaj persekutas... kaj mi multe suferis de tio, kaj mi komencis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plejparte al ĉiuj siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unu la alian.

\*\*\*\*\*

## Szöveg (5.)

### **Financoj de entreprenoj en la praktiko de Komerca kaj Kredita banka Akcia Kompanio helpe de konkreta ekzemplo (Resumo)**

Dum mia studado mia interesiĝo akcentis ĉefe la kreditpetadon de diversaj bankoj. Mi elektis la temon de mia diploma laboraĵo laŭ tiu principo. Precipe estis al mi interese, ke dum mia praktiko faka mi povis sperti la procezon de kreditdonanto, renkontiĝon de banka administrado kun prunteprenanto, kiu signifas la unuan paŝon de la kreditado.

Mi esploris per metodoj deduktivaj, tio estas mi proksimiĝis al konkretaj estaĵoj post la malkovro de ĝeneralaj aferoj. Nome mi esploris, kiel la elektita de mi banko, Komerca kaj Kredita Banko, uzas regulojn kaj dekretojn dum la kreditado per kurantaj bankkontoj.

Oni scias, ke la plej riska kaj plej malfacila tereno en la banka laboro estas kreditonado, ĉar la riskoj koncernas ne nur interezon, se la kapitalon mem. Antaŭ kreditdono la banko devas atenti pri:

- sumo de kredito, ĝia celo, kuranta tempo, ĉu ili kunordiĝas aŭ ne,
- materiala (mona) situacio de prunteprenanto kaj lia repaga povo,
- ĉu per la proponitaj garantiaĵoj la kreditprenanto plimalgrandigas la riskon de la repago.

Evidentiĝas, ke la decido pri kredit-repagpovo estas ege signifa kaj grava. En nia ekonomia vivo estas ĝenerala malcerteco, kaj tiu karakterizas nian ekonomikon el vidpunktoj de financa kaj pagipova, do la bankoj devas esti tre singardemaj kaj antaŭzorgemaj.

Kiam oni tralegas mian analizon pri la banka kreditdonado, ĝia proceso, oni povas pensi, ke komence de mia laboraĵo mankas la leĝo de Murphy kiel devizo: „Vi ricevas krediton, se vi pruvas, ke vi ne necesas krediton.”

\*\*\*\*\*

## Szövegértés ellenőrzése

### Szöveg (1.)

#### Gvidlibro tra Esperantujo: ĉio unulibre!

Ĉu ni, esperantistoj, bone konas la proprajn kulturon kaj historion? Ĉu multaj el ni povas fanfaroni pri kono de ne nur niaj plej grandaj verkistoj kaj movadanoj, sed ankaŭ de la plej gravaj gazetoj en Esperanto, eĉ se ili estis eldonataj antaŭ jam 100 jaroj? Ĉu ĉiu el la legantoj de ĉi tiuj linioj scias, kiu verkis la poemaron „La tajdo” aŭ al kiu skolo apartenas Georgo Kamaĉo?

La libro *Epitomo de esperantologio* donas respondojn al multegaj similaj demandoj, estante gvidlibro tra la tuta esperanta kulturo, historio, strukturo kaj idearo. La aŭtoro sukcesis kompili fakte malgrandan, sed sufiĉe detalan enciklopedion. Kaj malgraŭ tio, ke la libro celas esti helpilo al prepariĝo por la ekzamenoj de Rusia Atesta Komisiono, ĝi neprege estos interesa kaj utila ne nur al eksterrusianoj, sed ankaŭ al la personoj, kiuj tute ne emas ekzameniĝi aŭ ekzameniĝis jam antaŭ tre longe. Krom tio por ne tre spertaj esperantistoj la libro estos bonega ebleco tre komplete (tamen, kompreneble, nur supraĵe) pririgardi la tutan esperantan kulturon kaj elekti, kiun verkon eklegi, pri kiu aŭtoro ekinteresiĝi. Por la jam spertaj esperantistoj ĝi servos kiel tre utila help-libreto, enhavanta informojn, ŝajne pri ĉio, kio entute povas tuŝi la lingvon Esperanto. Kaj por ĉiuj la libro helpos pli facile kompreni, kion Esperanto signifas ĝuste por ni, ekkonscii pri la atingoj de la lingvo kaj movado, kaj ankaŭ pri iliaj problemoj.

Ni detaligu; la libro temas pri: interlingvistiko, historio de Esperanto, ideologio de Esperanto-komunumo, literaturo kaj kulturo en Esperanto (kie la aŭtoro tuŝas ankaŭ la kreadon de kantoj, teatro kaj filmoj en Esperanto), gazetaro kaj libro-eldonado (kun indiko de la plej grandaj Esperanto-eldonejoj), Esperanto-organizaĵoj kaj Esperanto-centroj, aranĝoj kaj renkontiĝoj. Aparta ĉapitro estas dediĉita al instruado de Esperanto. Krome la libro enhavas personan indekson (kie estas listigitaj ĉiuj personoj, menciitaj en la libro, kun mallongaj informoj pri ili kaj referencoj al la respektivaj paĝoj) kaj du aldonojn. En la unua troviĝas mallongaj informoj pri UK-oj (eszperantó világkongresszus), IJK-oj (ifjúsági eszperantó világkongresszus) kaj kelkaj rusaj Esperanto-aranĝoj; kaj en la dua estas kolektitaj la plej gravaj dokumentoj pri esperantismo.

Necesas do tuj atentigi, ke la libro tute ne estas scienca studo pri Esperanto kiel nur lingva fenomeno. Ĝi estas ĝenerala superrigardo de la plej diversaj priesperantaj temoj, kaj ĉi-rilate ĝi estos interesa kaj utila ne nur al gramatikemuloj kaj lingvistoj, sed al ĉiu, kiu tiel aŭ alimaniere okupiĝas pri Esperanto.

La libro estas plaĉe eldonita, kaj havas tre oportunan formaton. Tre bona estas ankaŭ la maniero, en kiu la aŭtoro prezentas la materialon – ĝi ne estas enciklopedie seka, sed la teksto estas konsekvenca kaj legeblas tute facile kvazaŭ iu historio. Tamen, kiel ajn dolĉa estu mielo, ĉiam troveblas iom da vinagro. Pro tio, ke la libro estis komence orientita por rusianoj, ĝi enhavas sufiĉe multe da detalaj informoj ĝuste pri rusa kaj sovetia Esperanto-movadoj, kiuj, eble, estos ne tiel profunde interesaj por la internacia leganto. Krome la aŭtoro ne ĉiam sukcesis prezenti la faktojn tute senpartie (pri kio li tamen avertas jam en la enkonduko). Tio neniel signifas, ke io en la libro ĝuis apartan atenton malprofite al ĉio alia – entute la libro estas sufiĉe unustila kaj modera pri ĉio.

Tre konfuzis nin la titolo de la libro. Kiel ni jam indikis, la libro tute ne temas nur pri esperantologio en propra senco de tiu vorto. Laŭ ni, la libro nur gajnus nomite iel malpli sciencce, sed pli konforme al sia enhavo. Ankoraŭ unu kuriozaĵo – inter dokumentoj pri esperantismo apud *La Espero* kaj la bulonja deklaro najbaras ... volapukista (volapük – az esperantót megelőző mesterséges nyelv) himno! Volapukan tekston akompanas esperanta traduko. Interese, kial nur Volapuko ĝuis tiun privilegion, sed ne aliaj planlingvoj?

Kaj la lasta bedaŭrindaĵo – estis, laŭ ni, tute facile indikadi la vivojarojn de ĉiu menciita persono ene de la teksto, por ke la legantoj pli facile orientiĝu, pri kiuj tempoj temas. Tiuj vivojaroj estas tamen indikitaj nur fine de la libro en la persona indekso, sed eĉ tie – ne ĉe ĉiuj personoj.

---

1. Milyen témákat fejt ki az elemzett könyv? (20)

2. Milyen negatívumokat említ a könyv ismertetője? (5)

---

## Szövegértés (2.)

### Junulara kongreso sen miss-oj

La Loka Kongresa Komitato de la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso en Zakopane decidis revivigi malnovan tradicion kaj okazigi belec-konkurson sub la titolo "Miss Esperantio". Lastfoje tia konkurso okazis en IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Debrecen, Hungario, en 1983. Jam printempe respondeculoj de UEA (Universala Esperanto-Asocio) klopodis konvinki la organizantojn rezigni pri la ideo, sed vane. Tamen, ja efikis protestoj de kongresanoj en Zakopane. Ankaŭ la bando Esperanto Desperado protestis kontraŭ la planita konkurso dum sia koncerto en Zakopane.

La Internacian Junularan Kongreson en Zakopane malfermis salutvortoj de la pola prezidento. En la programo estis parolado de eŭropa parlamentano, fama japana mecenato kaj pintaj bandoj. Tamen la plej preparolata programero estis la konkurso pri la plej bela kongresanino - kvankam ĝi ne okazis.

Jen kiel la organizantoj de la IJK prezentis la konkurson:  
*Ĉu vi estas bela? Ĉu vi estas knabino? Ĉu vi estas Esperantistino? Ĉu vi ĉeestos IJK-on? Tiukaze do ĝuste vi devas aliĝi al la konkurso "Miss Esperantio", kies celo estas elekti La plej*

*belulin' de IJK. Kion vi povas atendi? Nu - kiel kutime: mallonga sinprezento, promenado en vespera robo, libera disciplino = dancado, kantado, poem-deklamado... Aliĝu jam nun por la konkurso (valoraj premioj jam atendas!)*

La organizantoj ŝajne komprenis, ke ne ĉiuj aprezas belec-konkursojn, kaj aldonis apartan klarigon "por feministoj":

*Rimarko (porfeminista): Organizantoj ne celas malestimi inan sekson - tute male, ili per la okazaĵo volas kliniĝi antaŭ virinaj beleco, ĉarmo, kapableco, multflankeco (...) - kaj elekti "la plej" knabinon de Esperantio (malgraŭ konscio, ke ĉiu Esperantistino estas la plej...)*

Eble surprize por la organizantoj, ne nur reprezentantoj de la plenkreskula movado, sed ankaŭ tre multaj partoprenantoj de la IJK opiniis la ideon de belec-konkurso neaprobinda. Estis laŭtaj protestoj, kaj fine la jam anoncita konkurso estis nuligita.

– Pri tio mi persone ege ĝojas! La ideo organizi tiun konkurson dekomence estis fia, opinias la rusa kongresinto Oleg Izjumenko. Laŭ li, la cetera programo de la IJK estis tre bona, sed la planita konkurso estis tute neakceptebla.

– Tiaj konkursoj, pro tio ke ili fondiĝas sur patriarkiaj stereotipoj, malaltigas la rolon de virino, eliminis ŝian dignon, kaj degenerigas kaj la partoprenantojn kaj la spektantojn. Tial mi estis kaj daŭre estas kontraŭ ajnaj "belec-konkursoj".

– Ja eblas konkuri en aliaj kampoj, kiuj estas ne malpli gravaj ol fizika allogeco, kaj ja ankaŭ viroj povas partopreni diversajn konkursojn kune kun virinoj, tiel ne substrekante nur unu sekson aŭ gravecon de nur unu trajto (nome de fizika aspekto) de tiu sekso, opinias Oleg Izjumenko.

Kim Henriksen de Esperanto Desperado same ĝojas, ke la konkurso estis nuligita.

– Mi parolis kurte kun Vera de la LKK, laŭ ŝi oni rezignis pri la konkurso pro tro da protestoj de okcidentuloj... Cetere mi mem dum nia koncerto de Esperanto Desperado parolis kontraŭ la konkurso. Kiam ni kantis *Aline* ni ja en la fino kantas ke ĉiuj estas belaj (vi povas aŭdi ĝin sur la unua kasedo de Amplifiki –*Tute ne gravas*).

– Tio fakte memorigis min, kial ni havis tiun finon de *Aline*. Ĝi estis verkita dum la IJK en Debrecen en 1983, kiam mi lastfoje spertis ke oni aranĝis tian konkurson. Tiufoje ni fakte eĉ klopodis ridindigi ĝin en tiu maniero, ke ni estis pluraj viroj kiuj lasis inoj aligi nin en siaj nomoj, kaj poste ni venis vestite kiel inoj. Sed la aranĝantoj kaptis nian intencon kaj lasis nin promeni unue, kaj poste daŭrigis la konkurson...

Laŭ alia ĉeestinto, Chuck Smith, preskaŭ ĉio estis bona en Zakopane:

– La koncertoj bonis, la dancejo bonis, la programoj bonis... La sola malbona afero estis la malvarmeco kaj pluveco de la vetero, sed la organizantoj bedaŭrinde ne povis prizorgi tion.

Por Anderson Mills el Teksaso, Usono, la vojaĝo al Vilno kaj poste al Zakopane estis neforgesebla travivaĵo post dujara studado de Esperanto. En sia dulingva blogo li skribas:

– Mi ne posedis la kapablon por imagi kiel mirinda sperto estos; mia mensa framo ne sufiĉe grandis. Mi povis sidi kaj simple paroli kun homoj el la tuta mondo en personaj konversacioj, kiuj konkrete montris kiel mirinde similaj estas homoj dum ankoraŭ ili vivas laŭ sia propra kulturo.

Honora patrono de la IJK estis Aleksander Kwaśniewski, la prezidento de Pollando, kaj lian saluton oni legis en la solena inaŭguro. Estis 575 aliĝintoj al la kongreso, kaj pli ol centoj el ili helpis pri la programo de la kongreso. Inter la prelegantoj estis la esperantista EU-parlamentano Małgorzata Handzlik kaj la konata japana mecenato de Esperanto Etsuo Miyoshi.

Same kiel en Universalaj Kongresoj, merkredo estis ekskursita tago. Ĵaŭde oni aranĝis, laŭ metodo jam multfoje provita en Rusio, "lingvan festivalon" por ekstera publiko.

\*\*\*\*\*

1. Hol lesz az idei Nemzetközi Ifjúsági Kongresszus? (1)
2. Mikor és hol rendeztek utoljára Miss Esperantio-versenyt? (2)
3. Mikor, miről és milyen eredménnyel próbálta meggyőzni az UEA az idei IJK vezetőit? (3)
4. Mi az Esperanta Desperado, és hol tiltakozott a szépségverseny gondolata ellen? (2)
5. Kinek az üdvözlő szavaival nyílt meg az IJK? (1)
6. Mivel magyarázzák a szervezők a feministák számára írt megjegyzésükben a szépségverseny megrendezését? (5)
7. Kim Henriksen szerint mikor és hol keletkezett az *Aline* c. szám? (2)
8. Hogyan próbálták meg nevetségessé tenni a legutolsó szépségversenyt Kim Henriksenék? (4)
9. Mire panaszkodott Chusk Smith a rendezvény kapcsán? (2)
10. Hol írt Anderson Mills a kongresszuson szerzett tapasztalatairól? (1)
11. Mi történt a hagyományoknak megfelelően szerdán és csütörtökön a kongresszus alkalmával? (2)

\*\*\*\*\*

## Szövegértés (3.)

### Margene pri la temo de Ukraino

En la Hungara-Esperanta Meza Vortaro (Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1996) oni povas legi: „Ukrán I. (ember – homo) Ukrainano; (ukrán nemzetiségű - ukraina-devena gento) Ruteno; II. Ukraina; (nyelv – lingvo) Rutena.” (v. p. 763)

Laŭ mia opinio tiu difino estas eksterordinare erara. Estas malpermesate intermiksi du diversajn popolojn (gentojn, lingvojn, literaturojn, kulturojn, historiojn).

En malnova PIV (Plena Ilustrita Vortaro) (1970) oni skribas: „Ruteno. Ano de ĉefgento, loĝanta en Rutenujo. Rutenio, Rutenujo. Regiono, sudokcidente de Karpatoj, aparteninta al Hungarujo, al Ĉeĥoslovakujo, nun parto de Ukraino.”

Ni, hungaroj, scias, ke ekde la packontrakto en Trianon (Versailles/Versajlo), la 4-an de junio 1920 tiu estinta parto de Hungarlando apartenis al Ĉeĥoslovakio kaj ekde 1944 parte al Sovetunio. Nuntempe rutenoj vivas en Slovakio, Ukrainjo, Pollando.

La libro „La rutenoj” de Sándor Bonkáló (Franklin-Társulat, Bp. 1940.) ekde 1945 ĝis la komenco de 1989 estis tiel nomata „fermita verko”, do oni povis legi ĝin nur laŭ speciala permeso. Kial? Ĉar li pruvis, ke rutenoj kaj ukrainanoj estas diversaj popoloj. En la unua ĉapitro de tiu libro Bonkáló argumentas, ke la rutenoj en Subkarpatio ne estas praloĝantoj; ili translokiĝis por labori dum la 13-a–15-a jarcentoj; ili estis invititaj de sur la nordaj kaj nord-orientaj deklivoj de Karpatoj (Haliĉ, Podolina, Bukovina, Galicia). Laŭ sovetiaj fontoj Subkarpatio apartenis al la Kijeva Princlando dum la 10-a kaj la 11-a jarcentoj, do ĝiaj loĝantoj estis slavoj, kaj en la 11-a jarcento la hungaroj okupis tiun teritorion. Bonkáló refutas detale kaj science, ke rutenoj ne povis esti praloĝantoj en Subkarpatio. Cetere ofte oni nomis rutenojn „malgrandaj rusoj”, „rusinoj”, „hungaraj rusoj”.

El nia vidpunkto estas grave tio, ke oni ne povas identigi ukrainanojn kaj rutenojn. Oni povas diskuti pri tio, ĉu la rutena lingvo estas dialekto de la ukraina lingvo, aŭ ĝi estas memstara lingvo, ĉar tiu popolo havas siajn proprajn historion, literaturon, popolkostumojn, kutimojn, kulturon, religion. En 1975 oni doktoriĝis pri tiu temo en la Debrecena Universitato. Prave la temo de la disertaĵo estis la tuta vivo kaj scienca vojo de la plej fama ruteno, lingvisto, literatur-sciencisto, historiisto kaj kulturhistoriisto Sándor Bonkáló (1880-1959).

En Ukrainjo ne ĉiuj loĝantoj estas rutenoj. Rutenoj parolas rutene, ukrainanoj parolas ukraine, rusoj ruse, poloj pole, hungaroj hungare ktp.

- 
1. Miben különbözik a rutén és az ukrán nép? (5)
  2. Kik nem ismerik el ezt a különbséget? Mi ennek az oka? (2)
  3. A szovjet (ukrán) történeti források hogyan vélekednek a ruténekről (ruszinokról)? (3)
  4. Bonkáló Sándor nyelvész mit bizonyított? Milyen tényekkel? (7)
  5. 1945 és 1989 között miért nem lehetett szabadon olvasni Bonkáló műveit? (2)
  6. Hogyan nevezték régebben a ruténeket? (3)
  7. Milyen országokban élnek most rutének? (3)

\*\*\*\*\*

# TARTALOMJEGYZÉK (ENHAVO)

<b>Általános tudnivalók</b> .....	3
<b>Vizsgakövetelmények</b> .....	4
Írásbeli erősítő (1. rész) .....	7
Írásbeli erősítő (2. rész) .....	9
Írásbeli erősítő (3. rész) .....	12
Írásbeli erősítő (4. rész) .....	15
Írásbeli erősítő (5. rész) .....	18
Írásbeli erősítő (6. rész) .....	21
Írásbeli erősítő (7. rész) .....	24
<b>A tárgyeset használatáról</b> .....	27
<b>A magyar -ra, -re, -n, -on, -en, -ön ragok fordítása</b> .....	31
A magyar -ra, -re, -n, -on, -en, -ön ragok fordítása (feladatlap).....	33
Az eszperantisták 12 pontja .....	36
<b>ALAPFOK</b>	
<b>Komplett feladatsor</b> .....	<b>38</b>
<b>Szövegértés</b>	
Szövegértés (1.) Pri orientiĝo kaj okcidentiĝo .....	42
Szövegértés (2.) Sur propra tereno propra preĝejo.....	44
<b>Levélírás</b>	
Levél (1.) .....	45
Levél (2.) .....	46
Levél (3.) .....	47
Levél (4.) .....	48
Levél (5.) .....	49
Levelezési témák (feladatok).....	50
<b>Közvetítői készség vizsgálata</b>	
Közvetítői készség (1.) .....	59
Közvetítői készség (2.) .....	60
Közvetítői készség (3.) .....	61
Közvetítői készség (4.) .....	62
Közvetítői készség (5.) .....	63
Közvetítői készség (6.) .....	64
<b>KÖZÉPFOK</b>	
<b>Komplett feladatsor</b> .....	<b>66</b>
<b>Tesztek</b>	
Nyelvtani teszt (1.) .....	73
Nyelvtani teszt (2.) .....	76
Nyelvtani teszt (3.) .....	79
Nyelvtani teszt (4.) .....	82
Nyelvtani teszt (5.) .....	85
<b>Fordítás eszperantórol magyarra</b>	
Rövid szövegek kulccsal .....	89
Teljes szövegek	
1. La "prienergetikaj Oscar-premioj" .....	95
2. Ekspozicio trovis novajn speciojn da flaŭro kaj floro en Nov-Gvineo .....	95
3. Adriatika maro.....	96
4. La rolo de la germana lingvo en la internacia komunikado .....	97
5. La svisa modelo.....	97
6. Lingva identeco .....	98
7. Enmigrado anta kaj inta.....	98
8. Kio estas la Universala Esperanto-Asocio (UEA)?.....	99

<b>Irányított fogalmazás (Levéliírás)</b>	
Bevezetés.....	99
Befejezés.....	100
Levél (1.).....	100
Levél (2.).....	101
Levél (3.).....	102
Levél (4.).....	103
Levél (5.).....	104
Levél (6.).....	104
Levél (7.).....	105
Levél (8.).....	106
Levéliírasi témák.....	106
<b>Szövegértést ellenőrző feladatok</b>	
1. La fino de Vincent van Gogh.....	110
2. Kalocsay kaj Baghy en Ĉinio.....	111
3. Mia profesio estas stenografo.....	113
4. Parolas Pekino.....	115
5. Pri la revuo "Kontakto".....	116
6. Pri John Baüer.....	118
7. La boatisto.....	119
<b>FELSŐFOK</b>	
<b>Komplett feladatsor.....</b>	<b>122</b>
Tesztfeladat (1.).....	132
Tesztfeladat (2.).....	135
Tesztfeladat (3.).....	138
<b>Magyar szöveg tömörítése eszperantóul</b>	
1. London reneszánsza.....	142
2. Új liturgikus nyelvek.....	143
3. Mire jó az eszperantó?.....	144
4. Ki miért tanul eszperantóul?.....	145
5. Lesz-e semleges közös nyelvünk?.....	146
<b>Irányított fogalmazás, levéliírás</b>	
Levél (1.).....	147
Levél (2.).....	148
Levél (3.).....	148
Levél (4.).....	149
Levél (5.).....	150
Levél (6.).....	151
Levél (7.).....	152
Levéliírasi témák.....	152
<b>Fordítás eszperantóul magyarrá</b>	
1. Kiel rekrei la bildon pri Esperanto?.....	154
2. Memoro pri oi bela.....	156
3. Sur propra tereno estas propra preĝejo.....	157
4. Biografio de Zamenhof.....	157
5. Financoj de entreprenoj en la praktiko de Komerca kaj Kredita Kompanio helpe de konkreta ekzemplo (resumo).....	158
<b>Szövegértés ellenőrzése</b>	
1. Gvidlibro tra Esperantujo: ĉio unulibre.....	159
2. Junulara kongreso sen miss-oj.....	160
3. Margene pri la temo de Ukrainio.....	162
<b>Tartalomjegyzék.....</b>	<b>164</b>